

revuo

esperanto

marĉo 1964

57-a jaro

n-ro 700 (3)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



"ANGORDI"

ESPERANTO

revuo internacia

- enhavo** 41 Sepcent... kaj poste (Sadler)
La membro-statistiko 1963
- 42 Lerneja Bulteno n-ro 1:
Intensigo de la agado en la lernejoj
- 44 Ĉu vortarfarado povas esti finita? (Kawasaki)
- 46 Spertiĝu per magnetofono (Eichholz)
- 49 Forpasis Emilie Hodler
- 50 CED
Letero
- 51 Novaj libroj
Ricevitaj eldonaĵoj
- 52 Mallongaj novaĵoj
- 53 49-a Universala Kongreso, Hago, 1964
Kial "Adoptaj Gepatroj"?
- 54 Laŭlanda membrostatistiko por 1963
Esperanto en radio
Nekrologo: J. D. Applebaum
- 55 Memoriga kalendaro
- 56 La Juna Vivo
20-a IJK de TEJO, Amsterdam, 1964
- 57 Oficiala informilo
- 60 La poŝtmarkkolektado

kovrilo Jana Ravŝelj en la ĉefrolo de la 16-mm filmo "Angoroj", prezentota en Parizo (majo), Novjorko (julio) kaj Hago (aŭgusto).

foto 53 ANVV (Ĝenerala Nederlanda Turist-Oficejo)

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

esperanto
marto
1964

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri kongresoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario kaj estrarano pri informado, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

Se oni foliumas la jarkolektojn de la revuo "Esperanto", oni tuj rimarkas, kiel ĉiu epoko trudis sian karakteron ankaŭ al la organo de UEA. Kiel la naŭziĝo pro militmasakroj en 1917 (n-ro 200) kaj la postmilita baraktado de 1947 (n-ro 500), tiel ankaŭ la trajtoj de la hodiaŭa mondo speguliĝas sur niaj paĝoj.

Kompreneble, tio ne signifas, ke la ĝusta rolo de "Esperanto" estas raportado pri politikaj eventoj kaj sociaj ŝanĝoj. Kontraŭe, kiel organo de UEA ĝi devas servi la Asocion, gvidi kaj instigi ĝiajn anojn en ilia laboro por la vastigo de la Internacia Lingvo. Ĝi devas akurate, klare kaj objekte informi pri ĉiuj aspektoj de la agado por Esperanto, kiuj havas internacian gravecon. Nur tia-maniere eblas unuecigi la laboron de la membroj, kaj, per ili, de la pli vastaj tavoloj, kaj eviti ĥaosan duobligon de taskoj aŭ senperspektivan okupiĝon pri bagateloj.

Sed ne sufiĉas nura gvidado kaj instigado. Ne sufiĉas doni gvidliniojn por informado pri Esperanto, se la informantoj ne akiris pli ĝeneralan scion, per kiu rebati kritikojn kaj kontraŭargumentojn. Pro tio necesas pritrakti en la organo de UEA ĉiujn aspektojn de la lingva problemo, kiu en diversaj teritorioj kaj en diversaj medioj aperas sub diversaj kaj daŭre ŝanĝiĝantaj formoj. La maksimumo "Konu vian malamikon" validas ankaŭ por ni: nia malamiko estas nepersona, sed ne pro tio malpli stulta aŭ malbonfara. Ĝi estas la ĉiea lingva ĥaoso, kaj por efike agi kontraŭ ĝi ni bezonas precizan kaj ĝisdatan scion pri ĝia karaktero.

Efektive, la disradikiĝo de la lingva problemo estas tia, ke malmultaj estas la lokoj aŭ okupoj, en kiuj ĝi ne estas akceptita jam kiel neelsarkebla misaĵo. Ĝuste tiu ĉi fakto devigas nin turni atenton al la ekstera mondo kun ĉiam pli larĝa rigardo. Precipe gravas la evoluo de scienco kaj tekniko kaj, ligite kun tio, la evoluo de la postrestintaj kontinentoj. Kompreno pri la interefikoj inter tiu evoluo kaj la lingva problemo estas grava antaŭkondiĉo por utila laboro niaflanka. Pro tio ni ne hezitos dediĉi spacon al popularigaj artikoloj pri la progreso de la sciencoj, precipe kiam temas pri rimedoj de komunikado aŭ pri scienca analizo de la lingvo. Ĝuste sur la kampoj de telekomunikiloj kaj de la analizo de informoj la progresoj tuj pasintaj kaj ankoraŭ antaŭvidataj estas tiel gigantaj, ke ili kvazaŭ per lupeo enfokusigas la anakronismon de la diverslingveco.

Pro la samaj motivoj ni ne hezitas dediĉi adekvatan spacon al la malpli evoluintaj kontinentoj. Kvankam nia membraro en multaj landoj estas limigita pro ekonomiaj aŭ registaraj premoj, tio ne malhelpu nin atingi mondan pensmanieron, kiu, siavice, povos multon kontribui al la teritoria disvastigo de la Internacia Lingvo. La legantoj de ĉi tiu sepcenta eldono de "Esperanto" konsistigas larĝe dissemitan sed firme interligitan socian grupon. La celo de tiu unika grupo ne estu ia ekskluziva vivo en literaturaj turoj aŭ korespondaj rondoj, sed estu la pozitiva interliga rolo de plurmil homoj de 84 landoj inter la tri miliardoj da niaj kunhomoj. V. Sadler

La membro-statistiko 1963

Laŭtradicie aperas en la marta numero la jara statistiko laŭlanda pri la membraro. La ciferoj estas pli altaj ol en la pasinta jaro kaj rekordaj en la historio de la Asocio. Ni estas tre feliĉaj pro tio, sed tio tamen ne signifas, ke ni povas esti kontentaj. Unu rigardo al la nombroj de asociaj kaj individuaj membroj sufiĉas por ke altrudiĝu la demando, kial tiom da miloj da asociaj membroj restas ekster la individua membraro de U.E.A. Ĉu ili ne interesiĝas pri la riĉenhava, belaspekta revuo Esperanto, ĉu ili ne bezonas la jarlibron, tiun fonton de informoj kaj sciindaĵoj pri la tutmonda movado, ĉu ili ne opinias necesaj kaj subtenindaj la agadojn kaj rezultojn de U.E.A. ? Ni scias, ke inter ili estas pluraj miloj en landoj, de kie estas malfacile sendi kotizojn. Al ili ni povas nur konsili, ke ili faru kiel eble plej energiajn klopodojn ĉe siaj kompetentaj instancoj por ke estu kreitaj aŭ plilarĝigitaj la pageblecoj al Rotterdam.

Sed ankaŭ en landoj, de kie sen iu ajn malhelpo oni povas sendi iujn ajn sumojn al ek-

sterlando, la proporcio inter asociaj kaj individuaj membroj povus esti multe pli favora. Kiel serioza kaj konvinkita esperantisto povas kontentiĝi nur en nacia kadro, dum Esperanto estas tiel esence internacia afero? Ni vidas, ke en nur tri landoj la nombro de individuaj membroj superas tiun de la asociaj. Ili estas Aŭstralio (100 — 149), Svislando (94 — 270) kaj Usono (266 — 415). Ilin ni kore gratulas, sed tia stato devus ne esti escepto!

Apartan fidon en ĉiuj landoj ni havas koncerne la kreskon de la ciferoj pri la junaj membroj, pro nova favora aranĝo farita kun T.E.J.O. ek de 1964. En ĝi ĉefan rolon ludas la bela junulara revuo "Kontakto". Ni apelacias al absolute ĉiuj niaj membroj, varbi junajn membrojn, retrovi tiujn, kiuj lernis la lingvon sed eble poste perdiĝis kaj konservi tiujn, kiuj nun estas studentaj Esperanton. Kun ĉies helpo la statistiko 1964 montros krutatan altiĝon kaj samtempe la Asocio spertos inspiran fortikiĝon kaj ricevos eblecojn por ĉiam pli intensa agado.

Intensigo de la agado en la lernejoj

Plenumante la deziresprimon de la Rezolucio Adresita al UEA de la Beograda Konferenco kaj la respektivan decidon de la Komitato de UEA, la Estraro de UEA nomis apartan komisionon kun la nomo Konsulta Komisiono pri Lernejoj. Konforme al la menciita Rezolucio, la Komisiono tuj establis kontaktojn kun ILEI, TEJO, GEV kaj aliaj organizaĵoj kaj institucioj, kiuj en kiu ajn senco laboras en la sfero de lernejoj. Ĝia unua kunsido okazis en la oficejo de CED, Londono, sabaton la 1-an de februaro dum la tuta tago. La kunsidon ĉeestis sinjoroj Markarian, Zlatnar kaj la subskribinto, dum s-ro Malmgren, kiu pro troa okupiteco kaj granda distanco ne povis veni, sendis skribe siajn proponojn kaj esprimis al la Komisiono siajn bondezirojn.

La Komisiono detale pritraktis la plej taŭgajn formojn por la realigo de la decidoj de la Beograda Konferenco, elektis la plej urĝajn taskojn, faris tiurilate konformajn decidojn kaj planis la agadon ankaŭ por la pli malproksima estonteco.

La nuna situacio

En la lastaj jaroj la instruado de Esperanto en la lernejoj konsiderinde kreskis. Laŭ la statistikoj faritaj de CED, en la lerneja jaro 1962/1963 Esperanto estis instruata minimume en 563 lernejoj de 32 landoj al 16.272 geler-nantoj kompare kun 471 lernejoj de 27 landoj en 1961/1962, 356 lernejoj de 27 landoj en 1959/1960, 142 lernejoj de 22 landoj en 1955/1956 kaj 114 lernejoj de 15 landoj en 1950/1951. La tasko de la Komisiono estos kunordigi la tutan agadon en la sfero de lernejoj, prizorgi la realigon de la decidoj de la Beograda Konferenco, progresigi kaj vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj.

En sia laboro la Komisiono estos kiel eble plej elasta. La membroj interkonsiliĝos pri gravaj demandoj skribe aŭ, de tempo al tempo, en kunsidoj, sed ĉiu el ili plenumos memstare la laboron laŭ la jenaj ĉefaj branĉoj de agado: s-ro Malmgren prizorgos la rilatojn kun fakaj instruistaj neesperantistaj organizaĵoj; s-ro Markarian okupiĝos pri ĉiuj pedagogiaj demandoj. S-ro Zlatnar transprenis ĉiujn organizaĵajn demandojn, precipe la kontaktigon de lernejoj, la respondecon por organizo de internaciaj konferencoj kaj renkontiĝoj; la subskribinto plue prizorgos la rilatojn kun interŝtataj organizaĵoj kaj la agadon por la vastigo de instruado de Esperanto en la lernejoj.

Post la Beograda Konferenco estis entreprenitaj pluraj novaj paŝoj. CED eldonis du gravajn dokumentojn en Esperanto kaj en la angla: B/IV/9 kaj B/IV/10. La unua enhavas la kompletan liston de la lernejoj, en kiuj

Esperanto estis instruata en 1962/1963, dum la dua rilatas al la Beograda Konferenco kaj ĝiaj decidoj. La du dokumentoj en la angla estis senditaj ne nur al ĉiuj regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj, inkluzive la naciajn UNESKO-Komisionojn, sed ankaŭ al la Sekretariato de UNESKO en Parizo kaj al ĉiuj instruistaj landaj asocioj apartenantaj al Internacia Federacio de Instruistaj Asocioj (IFTA). Plue, la samaj du dokumentoj en Esperanto estis senditaj al ĉiuj landaj asocioj, ILEI, TEJO, kunlaborantoj kaj aliaj instancoj de la Movado. Fine, la Dok. B/IV/9 estis sendita al ĉiuj lernejoj menciitaj en tiu dokumento kun la sugesto, ke ili establu reciprokajn kontaktojn en la senco de la Beogradaj rezolucioj. Tiamaniere CED ĝustatempe kaj komplete plenumis sian devon.

Bedaŭrinde oni ne povas diri la samon rilate la landajn komisiitojn kaj landajn informajn fakojn. En la cirkulero de la 25-a de oktobro 1963 estis donitaj detalaj konsiloj pri la diskonigo de la laboro kaj decidoj de la Beograda Konferenco. Laŭ la ricevataj informoj, efektive nur la brita komisiito kaj Germana Esperanto-Asocio agis konforme al la rekomendoj.

S-ro Markarian sendis la rezoluciojn de la Beograda Konferenco al ĉiuj radio-stacioj, televido, fakaj revuoj kaj multaj gazetoj, entute en ĉ. 200 ekzempleroj. La rezulto, interalie, estis unu televida programo. En ligo kun la tuta agado por vastigo de la Esperanto-instruado en la britaj lernejoj, s-ro Williams aperis du fojojn en televidaj elsendoj, dum s-ro Markarian partoprenis en programo televida, en kiu, interalie, estis montrita ankaŭ klaso de Esperanto. S-ro Markarian prelegis la 21-an de februaro pri Esperanto en la lernejoj en la tria programo (la plej serioza) de BBC. La jarkunvenon de SBET de la 25-a de januaro ĉeestis la korespondantoj de la gravegaj *Times Educational Supplement* kaj *The Teacher*, kaj poste aperis tre favoraj longaj raportoj.

GEA tradukis la Ĝeneralan Rezolucion de la Beograda Konferenco kaj presigis ĝin en formo de aparta flugfolio, kiun ĝi vaste distribuis.

Tio estas ĉio kaj tio montras, ke denove grava evento restis neutiligita. Oni ne diru, ke "ne estas interesiĝo". La fakto estas, ke dank' al la brila laboro de la brita komisiito, la brita gazetaro, fakaj revuoj, televido kaj radio montris grandan interesiĝon kaj, ĝenerale parolante, pritraktas la aferon tre serioze. Plue, s-ro M. Van Aelst el Bruselo, kiu estas nek komisiito en la lerneaj aferoj, nek kunlaboranto pri informado, proprainiciate sendis la Rezolucion al diversaj belgaj gazetoj kaj pluraj fakaj revuoj kun la rezulto, ke informoj

aperis en 14 belgaj gazetoj kaj periodaĵoj. Tiu bonega rezulto, pro kiu s-ro Van Aelst estas gratulinda, evidente pruvas, ke interesiĝo ekzistas. Kompreneble, se diversaj sugestoj kaj liveritaj materialoj restas en tirkestoj kaj se neniu prizorgas, ke la gazetoj kaj fakaj revuoj estu informitaj, tute certe nenio aperos.

La plej lasta novaĵo el Jugoslavio estas, ke la edukaj aŭtoritatoj de Slovenio subvencios la instruadon de Esperanto en la lernejoj. Oni elektos la 12 plej bonajn lernejojn, en kiuj Esperanto estas instruata, kaj en ili ĝi fariĝos regula studobjekto kun salajrata instruisto. Tio signifas, ke la gelernantoj estos ankaŭ ekzamenataj. Plia signo de la favora de la edukaj aŭtoritatoj estas, ke la Sekretariato por Lernejoj en Slovenio pagis al s-ro Zlatnar la tutan vojaĝon al Londono por ĉeesti la kunsidon de la Komisiono.

Fine, estas necese menci, ke s-ro Markarian, kiel kunlaboranto de CED kaj membro de la Komisiono por pedagogiaj demandoj, entreprenis enketon pri la eduka valoro de la Esperanto-instruado en la lernejoj. La enketa demandaro estas sendita al sesdeko da lernejoj en diversaj landoj kaj la rezultoj aperos en formo de dokumento de CED nepre antaŭ la kongreso en Hago.

Decidoj pri la plej urĝaj taskoj

1. Pro manko de pedagogia revuo, la Komisiono provizore establos la kontaktojn kun la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, per aparta 4-paĝa informilo, kiu havos la titolon "Lerneja Bulteno". Tiuj 4 paĝoj estos senditaj al ĉiuj lernejoj, kiuj aliĝos al la "Interlerneja Interkonsento" konforme al la decido de la Beograda Konferenco. La "Lerneja Bulteno" aperos 3-4 fojojn jare. La unua numero — escepte 2-paĝa pro manko de spaco — aperas nun en tiu-ĉi numero de "Esperanto".

2. Por helpi al la infanoj, kiuj lernas Esperanton, akiri Esperantan literaturon, partopreni en infanaj renkontiĝoj kaj entute por kuraĝigi la infanojn lerni la lingvon, la Komisiono proponis, ke la Estraro de UEA establu apartan fondaĵon sub la nomo "Fondaĵo Lernejoj".

3. En la "Lerneja Bulteno" regule aperados konsiloj rilate al plibonigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj. Al la Esperanto-instruistoj la Komisiono konsilas trastudi la libron "Esperanto kaj Lernejoj", eldonitan en 1959 de Jugoslavia Esperanto-Federacio kaj la materialojn de la Beograda Konferenco, kie ili povas trovi interesajn ideojn. En unu el la sekvantaj numeroj de la "Lerneja Bulteno" aperos ankaŭ listo de diversaj legolibroj, taŭgaj por la lernejoj, kaj klasigitaj laŭ la facileco.

4. "Grajnoj en Vento" meritas plenan apogon kaj la Komisiono esperas, ke multaj novaj rondoj formiĝos. Ĉiuj Esperanto-instruistoj, kiuj deziras partopreni en tiu grava eduka laboro, bv. sin turni rekte al s-ro Marcel Erbetta, Rue des Pins 66, Bienne-Biel 7, Svislando.

5. La Komisiono varme rekomendas al la Esperanto-instruistoj abonigi siajn gelernantojn al infanaj kaj junularaj periodaĵoj: "Planeto", ilustrita gazeto redaktata de s-ro Niku Tumi, Pispalanharju 13, Pispala-Tampere, Finnlando; "Homo kaj Kosmo", revuo tre taŭga por iom pli aĝaj gejunuloj, redaktata de D-ro Gabriel Divjanović, Astronomia Observatorio, Zagreb, Opatička 22, Jugoslavio; "Kontakto", taŭga por gestudentoj, ĝenerale gejunuloj kaj geïnstruistoj, redaktata de s-ro Humphrey Tonkin, eldonata de TEJO kaj abonebla ĉe UEA.

6. La Komisiono plej insiste rekomendas al ĉiuj Esperanto-instruistoj en la lernejoj aliĝi al la "Interlerneja Interkonsento". La teksto de la Interkonsento kaj la aliĝilo estos senditaj per aparta klariga cirkulero al ĉiuj lernejoj en la Dok. B/IV/9 kaj al ĉiuj instruistoj, kiuj partoprenis la Beogradan Konferencon.

7. Interlerneja korespondado havas unuarangan gravecon ne nur por kuraĝigi la lernadon, sed ankaŭ por evoluigi ĉe la gelernantoj senton de internacia interkompreniĝo. Tial la Komisiono rekomendas al ĉiuj Esperanto-instruistoj utiligi multe pli vaste la servon de UEA "Koresponda Servo Mondskala" (vidu la Jarlibron, 1963, p. 118), la sistemon "Geonkloj Esperantistaj" kaj la rondojn "Grajnoj en Vento".

8. La Komisiono plene aprobis la tutan lernejan programon de TEJO kiel prezentitan al la Beograda Konferenco. Ĝi aparte rekomendas al TEJO organizi, interkonsente kun la koncerna instruisto, lernejan Esperantogrupon en ĉiu lernejo, en kiu por tio ekzistas ebleco. Same tiel ĝi rekomendas al la Esperanto-instruistoj formi lernejajn Esperantogrupojn kaj, se iel eble, ligi ilin al TEJO.

9. En la granda biblioteko de UEA en Rotterdam, kiu nun estas ordigata, troviĝu aparta pedagogia fako por faciligi la studon de pedagogiaj problemoj.

Pri la aliaj decidoj kaj la planoj por 1965 kaj postaj jaroj aperos informoj kaj artikoloj en la sekvantaj numeroj de la "Lerneja Bulteno". Intertempe, la ĉefa kaj plej urĝa afero estas ekagi tuj laŭ la konsiloj donitaj en tiu ĉi unua numero.

Ivo Lapenna

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ (KKL)

Generalaj kaj rilatoj kun internaciaj organizaĵoj: Prof. D-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, Britujo.
Rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 62 Rother Crescent, Gossops Green, Crawley, Sussex, Britujo.

Organizaj demandoj: S-ro P. Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Bonvolu ĉiam turni vin al la kompetenta membro laŭ la supraĵ-indikoj.

En 1957 Waringhien verkis *Grand Dictionnaire Espéranto-Français*. El ĉiuj Esperanto-vortaroj ĝi estas la plej nova, la plej granda kaj la plej bona. Li kolektis preskaŭ ĉiujn vortojn uzatajn nuntempe en praktiko, do lia vortaro estas la admirinda inventaro de nia hodiaŭa vortotrezoro. Li forĵetis nerekomendindajn vortojn, li normigis vortoformojn, do lia vortaro estas la plej fidinda gvidanto por tiuj, kiuj volas uzi nian lingvon en korekta formo. La klarigo en tiu vortaro estas farita en nacia lingvo, nome en la franca, sed alilingvanoj ne hezitu konsulti tiun vortaron, ĉar, eĉ sen kono de la franca lingvo, ili, se ili estas esperantistoj, povas ĝin iel utiligi. En la unua duono de nia jarcento francoj gvidis la tutan mondon per kompilo de bonaj vortaroj. Ni citu unu ekzemplon: Grosjean-Maupin. En la dua duono Francujo brilegas per Waringhien kaj lia vortaro.

Nun pri la temo de tiu ĉi artikolo. Kial mi diras: ĉu vortarfarado povas esti finita? — dum mi tiel laŭdas la superecon de la vortaro Waringhiena. Ĉar, unue, la afero de vortokolektado neniam povas esti finita. Kiel malfacile estas *elĉerpi* vortojn el la ekzistantaj tekstoj tiom multaj — tion ĉiu leksikografo bone spertas. Due, Esperanto ne estas finita, rilate al la nuntempa mondkulturo. Internacia lingvo devas respeguli la mondan kulturon, sed mankas al la hodiaŭa Esperanto multaj vortoj aktualaj kaj sciencaj. Trie, lingvoj neniām povas esti finitaj. Lingvoj kreskas ĉiutage. Aperas novaj vortoj laŭ bezono. Esperanto ne estas, devas ne esti, escepto.

Ĉi-sube mi donos kelkajn vortekzemplojn por atesti mian opinion. Du avertoj. Mi ne mencias tro teknikajn vortojn — tiajn registru teknikaj vortaroj. Mi ne celas kompletecon de ekzemploj. Mia deziro estas, ke la legantoj de mia artikolo komprenu, ke vortarfarado ne estas finita afero.

"Esperanto"
skribita per
kanaoj

エスペラント

LINGVOSCIENCO. Apud *labialo* estu *lateralo*, *alveolaro*, *kakuminalo* (ekz. en sanskrito), k.a. Apud *diftongo* estu *triftongo*. Apud *runo* (litero skandinava) estu *ogamo* (kelta), *kanao* (japana), *hangulo* (korea. La termino *omuno* estas forĵetita en la nuna Koreujo). Apud *infinitivo* estu *finitivo* (-as, -is, -os, -us, -u. Bona vorto en la Plena Gramatiko de K. kaj W.) Apud *diminutivo* estu *aŭgmentativo* (-eg-), *pejorativo* (-aĉ-). Apud *singularo*, *pluralo* estu *omnialo* (Franca termino de Bréal. Ekz. Virinoj estas babilemaj). Apud *dialekto* estu *idialekto* (lingvaĵo *propra* al unu individuo). Apud *sinkrona* estu *diakrona* (t.e. tratempa. Ambaŭ estas gravaj terminoj en la teorio de F. de Saussure). *Fonemiko* (sonsistemo konceptata idiome de ĝiaj uzantoj) estas pli klara ol *fonologio* (diverssignifa laŭ lingvistoj). *Stamo* (Collinson) estas pli klara ol *radikalo*. Stamo kaj *radiko* ne estas ĉiam identaj (ekz. la greka: lue *te* '(vi) solvas'. lu, radiko. lue, stamo. te, finaĵo). En Esperanto dentala r kaj

uvulara r povas esti alofonoj, sed ne ekzistas *alomorfoj* kiaj estas en la angla: *books(-s)* kaj *dogs(-z)*, sed ununure: -j. Dum *apofonio* (ekz. la angla: *begin*, *began*, *begun*) estas sufiĉe internacia formo, *umlaŭto* (ekz. la germana: *Gast*, sg. — *Gäste*, pl.) estas laŭsone tro germaneca, sed ĝi estas uzata, kiel tia, en multaj lingvoj, kaj ĝin akceptas Butler. Se oni enkondukas *vokoidon*, *kontoidon* (Anglaj terminoj de Pike) por uzo en fonetiko kaj destinas *vokalon*, *konsonanton* al fonemika uzo, la afero fariĝas pli oportunus traktebla (ekz. la angla table: *l* estas, en tiu vorto, fonetike: kontoido, sed fonemike: vokalo). Ankoraŭ multaj terminoj estas necesaj eĉ por populara traktaĵo prilingva (vidu verkojn de Collinson), sed hodiaŭ mi finu la liston per *metalingvo* (lingvo de lingvo), uzata de Pumpr.

Ĉu vortarfarado

LITERATURO. Literaturaj specoj estas ja multaj en la mondo. Japanoj povas proponi: *noo* (klasika lirika dramo. Oni prezentis ĝin en la Universala Kongreso en Sofio), *senrĵuo* (samsilaba kun hajko, sed epigrameca), k.a. Persajn *robajojn* lerte tradukis Waringhien. Enkondukante *trovatoron* (nordfrancuja), Albault diferencigas ĝin de *trobadoro* (sudfrancuja). La oficiala formo *romantiko* (en senco de ismo) ne estas tiel bona. *Romantismo* ekzistis jam en la Plena Vortaro de Boirac kaj hodiaŭ ĝin uzas Auld.

MUZIKO. Nuntempe laŭmodaj estas ekz. *mambo*, *muzikalo* (Wingen).

ARKITEKTURO. Hōryūzi estas la plej malnova konstruaĵo budaisma en Japanujo (7-a jarcento). La lignaj kolonoj havas *entazon* (Azorin — ŝveliĝo en la mezparto), kio estas la prainfluo de la greka arto. Preĝejoj aŭ sanktejoj estas specife esprimataj: sinagogo, kirko, moskeo, templo. *Jaŝiro* de japana ŝintoo estu aldonita.

RELIGIO. Ni kompletigu la trion de la budaismaj kanonoj (*tripitako*), aldonante al *sutro* (predikaĵo) la du aliajn: *abidarmo* (komentario), *vinajo* (disciplino). Krom Septuaginto ekzistas kelkaj tre malnovaj tradukoj de la Malnova Testamento, ekz. *Targumo* (okcidentaramea). Mahometanoj preĝas en la direkto de Mekka, t.e. *kiblo* (Fundamenta Krestomatio). Waringhien forgesis registri *bahaismon*. Se oni priparolas pri *lingamo*, menciui ankaŭ *jonion*. *Ordalo* (Bennemann. Por ekhavi dian juĝon, oni trempigas la manon de la akuzito en varmegan akvon — se sendifekta, tiam senkulpa) estis praktikata ne nur en Germanujo, sed ankaŭ en la malnova Japanujo kaj aliloke.

FILOZOFIO. En sia filozofio Kant severe distingas *transcendentalan* -n (Albault) disde *transcenda*.

PSIKOLOGIO. Nun iom populariĝintaj vortoj: *engramo* (restanta spuro de mensaj impresoj ĉe nerva sistemo), *ambivalenta* (karaktero havanta du aspektojn radikale diferencajn).

POLITIKO. Se la aparta teritorio de la regno A ekzistas en la interno de la regno B, ĝi estas *eksklavo* por A kaj *enklavo* por B (ambaŭ en STT).

JURO. Juristo Lapenna uzas *preamblon* (antaŭteksto).

EKONOMIKO. Post *inflacio* povas okazi *disinflacio* kaj *reflacio*.

BIOLOGIO. Kune kun *ĉelologio* ni havu internacian *citologion* (Briquet). Ĉe embriogenio antaŭ la stacioj de *blastulo* kaj *gastrulo*

micino kiom da personoj saviĝis! En Japanujo ni uzas sekigitan bonitaĵon por aldoni guston al kuirataj manĝaĵoj. Antaŭ ne longe la sekreto de tiu gusto malkovriĝis: efiko de *inozinata acido* (nun tiu vorto estas tre populara inter japanaj edzinoj). *Polietileno* kaj *vinilono* estas vaste aplikataj al diversaj aĵoj ĉiutage uzataj.

MINERALO. Oni uzas 10 specojn de mineraloj por mezuri la gradon de malmoleco de iu mineralo. Al la vortaro de Waringhien mankas unu el ili: *apatito*.

MATEMATIKO. Matematika lingvistiko progresas. En la studo de komunikado oni uzas la anglan vorton *bit* (en binara sistemo), sed en Esperanto *bito* jam ricevis maristan sencon. Konsentante kun Gleason, "An Introduction to Descriptive Linguistics", 1955, kiu preferas la formon *binit*, mi proponas en Esperanto *biniton*, kiu estas laŭforme pli klara ol *bito*. *Histogramo* (grafikaĵo montranta distribuon de oftecoj) pli bone komprenigas la rezultojn de statistiko. Kaj el statistiko evoluis *stokastiko* (uzante la teorion de probableco, konjektas). *Topologio* estas unu branĉo de geometrio.

FIZIKO. En Meteologia Terminaro troviĝas *cunamo* (altaj ondoj invadantaj la marbordon kaŭze de tertremo aŭ de marfunda erupcio). Ĝi estas japana vorto internaciiginta en diversaj lingvoj. Alpinistoj trakurigas sur mapo siajn okulojn laŭ *izohipsoj* (linioj de egala alteco).

TEKNIKO. Ĉar *aŭtomato* estas aparato, *aŭtomacio* estas pli preferinda ol *aŭtomatigo*. Por mikroskopa esplorado oni uzas *mikrotomon* por tranĉi aĵon ekstreme maldike. Novaj inventaĵoj: *batiskafo*, *vostoko*, k.a.


GEOLOGIO. Observema vojaĝanto rigardas montan lagon kaj juĝas ĝin *kaldero*.

SPORTO, LUDO. Inter olimpikaj ludoj estas *pentatlono*. *Basbalo* estas tre amata ludo de japanoj (*bazopilko* ne estas taŭga vorto). Boksistoj *klinĉas*. Ĉampionoj de rugbeo *skrumas*. *Goo* kaj *maĵao* estas ĉinaj ludoj, sed ankaŭ japanoj kaj aliaj ilin ludas.

MANGAĴO. Mi tre amas manĝi *spageton* kaj volas trinki *benediktino* -n (pli facile uzebla formo ol *benediktlikvoro*). La distingo, farita de Albault, inter *kolbaso* kaj *salsico* (mola) estas akceptinda.

VESTO. *Rubaŝkon* kaj *anorakon* (origine eskima) ankaŭ japanoj portas iafoje.

DIVERSAJ. Waringhien *editoris* Lingvajn Respondojn de Zamenhof, estante nek redaktoro nek eldonanto. Collinson uzas: *optimume*. En Zamenhof, Fabeloj de Andersen, vol. IV troviĝas *ŝlifi*. Kiel *unio* disiĝis de *unuiĝo*, tiel apartiĝu *unito* (mezurunuo) disde *unuo*. Schwartz simpligas *plagiati* al *plagii*. Mi preferas (ne *preferencas*) *diferi* al *diferenci* (vidu Neergaard). *Dina* (maldika) ne estis tiel favorata, *minca* (Hungara-Esperanto Vortaro, 1958) estas pli esprimopova.



historigramo de nia legantaro laŭ kontinentoj

povas esti finita ?



ekzistas la stadio de *morulo*. En heredoscienco karaktero *dominanta* kontrastas al karaktero *recesiva* (Albault).

BOTANIKO. Gardenkulture konataj estas *kosmoso*, *frizio*, k.a. Internacie famaj estas *raflezio* (La floro havas 1 metron da diametro en la Malajaj Insuloj), *velviĉio* (strangforma, en Okcidenta Afriko), *ravenalo* ('Arbo de vojaĝanto' en Madagaskaro), *leŭkadendro* (Folioj arĝentharaj en Kaplando), k.a. Vidinte la bildon de *makrocisto* (longa je 300 m.) en "Sekretoj de la Marestaĵoj", mi eterne memoras la nomon de tiu planto. Ĉerizarbo kaj *sakuro* estas tute malsamaj. *Sakuro* neniam odoras (Grabowski mistradukis japanan poemon, ne povante kompreni la veran sencon de unu japana verbo).

ZOOLOGIO. *Ugviso* ne estas japana *najtingalo*. Heltage kantas ugviso. *Niponio* ne estas la nomo de lando, sed tiu de birdo. Ĝi similas al *ibiso*, sed la sola specio (*Nipponia nippon*) vivas nur en Japanujo kaj ĝi estas pro multeco leĝe protektata. *Celakanto*, kies prauloj pereis antaŭ 300 milionoj da jaroj, kaptiĝis lastatempe proksime de Madagaskaro. *Pitekanthropo* (Java) sekvas *sinantropo* (Pekina), kiu jam scias uzon de fajro.

MEDICINO. Eĉ lingvistoj, se ili volas kompreni la fiziologian flankon de parola funkcio, devas koni vortojn, ekz. *hipotalamo* (en cerbo), *sinapso* (ĉe nervo), *statolito* (en orelo), k.a. Lingvoscienco multon lernas de *agramatismo* (Briquet. Malkapablo formi korrektajn frazojn).

KEMIO. Eĉ japanaj infanoj konas multajn vortojn de organika kemio, ekz. *asparagino*, k.a., vidaŭdante per televidilo komercajn reklamojn de medikamentoj. Laŭ la raporto de gazeto iu veneniĝis, pro tio ke la manĝita kuko estis kolorigita per *aŭramino*. Per *aŭreo-*

Spertiĝu en la parola formo de nia lingvo per helpo de magnetofono !

Rüdiger Eichholz

Ĉiu kulturlingvo ekzistas en parola kaj skriba formoj. Ĉe la naciaj lingvoj la parola formo ludas pli gravan rolon ol la skriba: Ĉiu infano unue lernas paroli kaj nur kelkjarajn poste, kiam ĝi jam certgrade regas la lingvon, ĝi lernas legi kaj skribi. Ankaŭ en la vivo de 'meza' plenkreskulo, se oni statistike mezurus la tempon, kiun li pasigas dum laboro kaj libertempo parolante kaj aŭdante en komparo kun la tempo, dum kiu li legas aŭ skribas, la unua certe superus la duan minimume en la proporcio 10 : 1.

Ĉe la internacia lingvo, laŭ mia opinio, ekzistas precize la inversa situacio: La plej multaj esperantistoj lernis la lingvon per memstudo el libroj. Sen nigraj tabuloj kursoj ne povus funkcii, kaj la nombro de la denaskaj esperantistoj, de personoj do, kiuj unue lernis nur la parolan formon, estas neglektebla kompare al la nombro de la tuta esperantistaro. Ankaŭ se oni statistike esplorus la tempon, kiun mil esperantistoj pasigus aŭdante aŭ parolante esperanton en komparo kun la tempo dum kiu ili legas, korespondas aŭ verkas esperantlingve, oni verŝajne trovus rezulton similan al la inversa proporcio 1 : 10.

La kaŭzoj de tiu situacio estas facile imageblaj: Izoleco de la esperantistoj, relativa malofteco de kongresoj kaj klubkunvenoj, kaj la bedaŭrinda fakto, ke la plej multaj esperantistoj ne uzas esperanton kiel familian lingvon ĉiutage. Pro tio do la nombro de la esperantistoj, kiuj vere flue parolas, estas malgranda proporcio al la nombro de la esperantistoj, kiuj sufiĉe bone regas la skriban formon. Ankaŭ nia literaturo respegulas tiun malekvilibron: Nia poezia lingvo estas riĉa, multaj esperantistoj opinias eĉ tro riĉa, dum simplaj ĉiutagaj esprimoj ne estas sufiĉe precizaj. Kaj tiuj, kiuj estas precizaj, ofte ne estas konataj eĉ al spertuloj, ĉar ĝenerale ili ne uzas la lingvon parole dum la ĉiutaga vivo.

Ĉu la kaŭzoj por la ĝisnuna neglekto de la parola formo de nia lingvo estas forigeblaj? La parollingvan izolecon ni povas forigi per la helpo de magnetofonoj. Same kiel la invento de la presarto ebligis la disvastigon de la lingvoj en presita formo kaj antaŭe ne imageblan interŝanĝon de pensoj per la presita vorto, tiel nun la invento de la magnetofono ebligas al ni por la parola lingvo venki la limojn de tempo kaj spaco. Ni nur devas lerni utiligi tiun novan teknikan helpilon.

La parolantoj de la Internacia Lingvo formas la plej vaste distribuitan lingvan komunumon de la mondo. Tial por ili la modernaj komunikiloj ludas gravegan rolon.

La Magnetofona Servo de UEA
fondita en 1957
povas fariĝi tre efika rimedo
por kreskigi la solidarecon
de la esperanta "popolo".

En tiu ĉi speciale verkita
artikolo, la gvidanto de la
Magnetofona Servo donas aron da
praktikaj konsiloj bazitaj sur lia
longa sperto.

Por pliaj informoj turnu vin
al la Jarlibro 1963/I, p. 120, aŭ
al Esperanto Press, Oakville,
Ontario, Kanado.

Generalaj teknikaj rimarkoj

Ofte mi ricevas leterojn en kiuj oni demandas min, kiuspecan magnetofonon mi rekomendas aĉeti, kiujn rapidecojn la maŝino havu, aŭ kiomtraka ĝi estu. Mi ne konas ĉiujn produktojn sur la tutmonda merkato, do ne povus diri, kiun maŝinon mi konsideras la plej bona. Sed mi povas rekomendi priatenti jenajn specifikojn je aĉeto de magnetofono:

1. Grandeco de bobenoj. La grandeco de la diametro de la plej grandaj surmeteblaj bobenoj estu 18 cm. Se oni povas surmeti nur pli malgrandajn bobenojn ekestos malfacilaĵoj je pruntado aŭ interŝanĝo de sonbendoj, ĉar la 18-centimetraj bobenoj estas la plej ofte uzataj.

2. Rapidecoj. La ĉefe bezonata rapideco estas 9,5 cm/sek. Por altfidela reprodukto de muziko oni uzas ankoraŭ 19 cm/sek, sed tiu rapideco gravas hodiaŭ nur por fidelecfanatikulo, ĉar la magnetofona tekniko tiom progresis dum la lasta jardeko, ke oni apenaŭ povas rimarki diferencojn inter surbendigoj faritaj je 19 cm/sek kaj 9,5 cm/sek. En la arkivo de la Magnetofona Servo la plej multaj originaloj estis faritaj 9,5 cm/sek (escepte de tiuj indikitaj per *en la jarlibro por 1964), do ne valoras mendi kopion je pli alta rapideco, ĉar la perditaj plej altaj frekvencoj ne regajniĝus per la kopia proceso.

Por ŝpari sonbendmaterialon estas rekomendinde, ke la magnetofono povu reprodukti ankaŭ la rapidecojn de 4,25 cm/sek, kaj se eble ankoraŭ la rapidecon de 2,125 cm/sek, kiuj estas sufiĉe bonaj ankoraŭ por parola uzo. Aparatoj kun tiuj rapidecoj estas eble iom pli multekostaj, sed se oni intencas multe uzi la maŝinon, oni baldaŭ ŝparos la plian sumon pro tio, ke oni ne devas aĉeti tiom



*la
magnetofona
servo de
UEA
disponigas
al vi grandan
sortimenton
da valoraj
registraĵoj*

da sonbendmaterialo. Por registri samlongan programon oni bezonas je 4,75 cm/sek nur la duonon kaj je 2,375 cm/sek nur kvaronon de la bendmaterialo, kiun oni bezonus je 9,5 cm/sek. Je intersaĝo de sonbendoj ankaŭ la afrankkosto estas konsiderindaj, kiuj ankaŭ duoniĝus aŭ kvaroniĝus.

3. Trakoj. La samaj konsideroj valoras por la kvanto de trakoj, kiujn magnetofono povas registri sur bendon. Kvartrakaj aparatoj registras nur sur kvarono de la larĝo de la bendo, dum dutrakaj aparatoj utiligas la duonon de la larĝo. Kvartrakeco do denove duonigas la koston por sonbendmaterialo kaj ekspedo. Tamen je bonaj maŝinoj la sonreprodukto estas bonega. Oni povas antaŭvidi, ke dutrakaj maŝinoj baldaŭ malmoderniĝos kaj pro tio mi rekomendas nepre aĉeti kvartrakan maŝinon.

Per kvartraka maŝino oni povas reaŭdigi ĉion, kion dutraka maŝino registris. Oni ankaŭ povas registri per kvartraka maŝino programon uzante nur la trakojn 1 kaj 4 poste reaŭdigi ĝin per dutraka maŝino, kondiĉe ke oni uzis novan sonbendmaterialon. Malfacilaĵoj ekestas nur, se dutrakulo sendas bendon al kvartrakulo, kiun tiu resendu kun propra registro, ĉar tiam la kvartraka aparato ne forviŝus la tutan surbendigon de la dutraka aparato. Tamen per tutbobena forviŝilo la posedanto de la kvartraka magnetofono povas tute forigi la dutrakan programon antaŭ la surbendigo de nova programo per la kvartraka maŝino. Tutbobena forviŝilo estas facile memfarebla el forĵetota malbona kurento-transformilo. Detalojn pri tio legu en mia artikolo en la Nordamerika Esperanto-Revuo, marto 1963, p. 39. (Represo havebla de mi kontraŭ stelo aŭ respondkuponon).

Uzebloj de magnetofono por individuoj

Por izolitaj esperantistoj kaj por lernantoj de la lingvo magnetofono estas ideala amiko. Ĝi parolas tiel longe kiel oni volas kaj oni ankaŭ povas paroli al ĝi kaj pere de ĝi kompari sian parolmanieron kun tiu de aliaj esperantistoj.

Antaŭnelonge mi ricevis leteron de usona esperantisto, kiu skribis al mi, ke li eklernis esperanton jam antaŭ pli ol 20 jaroj, kaj ke de la komenco de lia lernado li voĉlegis la tekstojn, ĉar "la plej komprenebla parolmaniero estis lia ĉefa intereso". Kiam li nun aĉetis magnetofonon li konstatis, ke li ne povas kompreni eĉ la plej spertajn esperantistojn, kiuj parolis dum kongresoj. Li estis tiom certa, ke lia parolmaniero estas la modela 'lernolibra' maniero, ke li registris por mi partojn el la Fundamenta Krestomatio, por ke mi disvastigu lian parolmanieron. Mi ne povis plenumi tiun deziron, ĉar kvankam kompreneble, li parolis kun fortega usona akcento kaj neniel modele. Liaj leteroj pruvis al mi, ke kelkaj personoj ne povas lerni lingvon nur el libroj. Li vane penegis dum jaroj kun la rezulto, ke li devus nun ĉion relerni, kio estas pli malfacila ol novlerni, se li volus akiri pli internacian parolmanieron.

Per utiligo de magnetofonoj ni povas eviti tian mislernadon, ĉar ni nun povas doni al izolitaj esperantistoj sonantan fundamenton laŭ kiu ili sekure povas lerni. Ŝajnas al mi utile surbendigi tiucele la tutan Fundamentan Krestomation. Pro tio mi nun petas esperantistojn el la tuta mondo, kiuj opinias, ke ili modele elparolas nian lingvon, ke ili surbendigu partojn el la Fundamenta Krestomatio, tiel ke iom post iom la tuta Kresto-

Por plibonigi sian prononcon

matio estos havebla ankaŭ en sonbenda formo. Estus bone, se tiun surbendigon partoprenus esperantistoj el kiel eble plej multe da diversaj landoj, por ke la surbendigo fariĝu vere internacia. Mi petas, ke interesitoj unue skribu al mi indikante, kiujn partojn ili volus registri, kaj demandante, ĉu tiuj partoj estas ankoraŭ liberaj. Rekompence ĉiu kontribuinto ricevos kopion de programo laŭ sia elekto el la listo kaj laŭ la kondiĉoj de la Magnetofona Servo.

Ankaŭ individua teleinstruo povas okazi per magnetofono. Mi opinias, ke la landaj asocioj devus aranĝi krom korespondaj kursoj ankaŭ sonbendajn telekursojn. Por tiuj kursoj oni ne nur registru tekstojn el lernolibroj, sed oni kunsendu ankaŭ etan sonbendon, sur kiun oni registru unue nur la unuopajn vokalojn, poste vortojn kaj fine mallongajn frazojn, lasante sufiĉe da spaco inter la registritaj eroj, tiel ke la lernanto povas interregistri sian propran voĉon. Post la interregistro la lernanto povas kompari sian parolmanieron kun tiu de la instruisto kaj plibonigi ĝin. Aŭ li povas resendi tiun sonbendeton al la telekursgvidanto, kiu povas individue atentigi lernantojn pri eraroj.

Komencantoj ofte petas min pri programoj, por kiuj la teksto estas havebla. Tiucele mi nun alvokas al surbendigo de la Fundamenta Krestomatio. Sed por ke oni jam nun povu okule sekvi parolatajn vortojn, mi kunkopiis la programaron 34, en kiu estas kunigitaj la programoj 49, 65, 125, 137, 143, 159, kies tekstoj estas kunbinditaj en 6-stela tekstlibreto.

Sed izoluloj ne nur lernu la lingvon korekte kaj ekzercu sin en pasiva aŭdado, ili ankaŭ voĉpondante (= voĉe korespondante) uzu esperanton. Voĉpondado estas multe pli interesa ol korespondado. En eta sonbendo oni povas multe pli detale kaj senpene esprimi siajn ideojn ol en longega letero. Sed voĉpondado estas arto, kiun oni devas lerni, same kiel oni devis lerni skribi bonajn leterojn. Post ofta provado oni kutimiĝas paroli al maŝino. Antaŭ la surbendigo oni faru nur mallongajn notojn pri tio, kion oni volas diri, kaj dum la surbendigo oni provu libere eldiri ĉion. Ne gravas, se oni tiam faras eraron aŭ ne plu scias, kion diri. Oni simple rekurigu la bendon kaj denove enparolu la fuŝitajn vortojn. Ne ekzistas pli bona rimedo por venki siajn psikajn malhelpojn kaj por lerni fluan parolon... Pli facile estas, se du aŭ tri personoj kune surbendigas programon; la interparolo estas tiam pli vigla kaj por la aŭdontoj pli interesa.

Jam en 1957, kiam mi fondis la Magnetofonan Servon, mi intencis peri voĉpondantojn. Tiam mi ne sukcesis, ĉar ne sufiĉe da personoj anoncis sin kaj mi pro tio baldaŭ limigis miajn taskojn al kolektado kaj kopiado de programoj. Intertempe interesiĝo pri voĉpondado kreskis, kaj mi tre ĝojas, ke antaŭ ne longe fondiĝis ILEF (Internacia Ligo de Esperantistoj Foto- Kino- kaj Magnetofon-

amatoroj), kiu volas i.a. instigi al interŝanĝo de sonbendoj kaj organizi konkursojn por plej bone prezentitaj kaj registritaj programoj (prelegoj, deklamado, kantado ktp). Mi do petas, ke voĉpondemuloj skribu estonte al la adreso de la magnetofona sekcio de la Ligo: Petro Poliŝĉuk, Novo-Moskovskaja 18, kv. 15, Taŝkent-52, Sovetunio.

Alia uzeblo de magnetofono por individuoj ĝis nun preskaŭ ne utiligata estas sonbenda publikigo de verkoj, kiuj alie ne povus trovi eldoniston. Etkvanta presado estas multekosta afero, la parolata vorto kontraŭe povas esti facile registrita de la aŭtoroj mem kaj kopiita per sonbenda aparato. Verkoj, kiuj alie pereus en la tirkesto de la verkinto aŭ tradukinto povus tiel trovi almenaŭ etan publikon. Sed ankaŭ surbendigo de jam aperintaj libroj estas valora precipe por blindaj esperantistoj.

Uzebloj de magnetofono por grupoj

Magnetofono povas esti bonega instigilo por veki dormantan grupon, ĉar pere de ĝi oni vere povas laborigi ĉiujn anojn. Sed oni devas tion lerte fari, ĉar nura aŭdigado de longa programo povas havi la kontraŭan efikon. Ne prezentu al komencantoj longan prelegon. Depende de la lingvoscio aŭdigu nur kelkajn frazojn, ripetu aŭ resumu ilin mem post la aŭdado, por ke ĉiu komprenu la diritaĵon, daŭrigu la aŭdigon de la bendo ktp. Post fino de parto de la programo aŭdigu la tutan parton denove kune kaj petu grupanon, ke li resumu la enhavon de la parto. Tiel komencantoj kutimiĝas aŭskulti diversnaciajn parolmanierojn kaj atente sekvi la vortojn.

Sed pli valora ol pasiva aŭskultado estas preparo de programoj fare de la grupo mem. Bedaŭrinde ĝis nun nur tre malmultaj grupoj penis fari tion. Ĝis nun preskaŭ ĉiuj 161 programoj en la kolekto de la Magnetofona Servo estas surbendigoj de kongresaj aranĝoj, radio-programoj aŭ kontribuoj de individuaj esperantistoj. Esceptoj estas nur la programoj 70, 87, 88, 89 kaj 112, kiujn preparis la Antverpena, Rejkjavika kaj Edinburga Esperanto-Societoj kaj la Esperanto-klubo de Trentham, Novze-lando. Speciale valora el tiuj programoj estas trihora islanda programo, kiu klarigas islandan historion, muzikon kaj literaturon. Estus valorege por la aprezado de kulturaj valoroj de aliaj popoloj, se similaj programoj ekzistus por ĉiu lando. Ellaborado de tiaj altnivelaj programoj certe ne estas facila tasko, sed tasko per kiu oni multe lernas kaj plibonigas sian lingvoscion.

Kio mankas ankoraŭ en la kolekto de la Magnetofona Servo estas bone prezentitaj kaj surbendigitaj teatraĵoj kaj kantoj, por kiuj la teksto estas ankoraŭ havebla en presita formo.

Ĉiu grupo do provu fari kontribuon al la Magnetofona Servo. Kion oni produkti dependos kompreneble de la talentoj de la grupanoj, sed io certe estas farebla, se oni iras al la kunvenoj ne nur por distri sin kaj esti amuzita. Rekompence la grupoj ja ricevos alian programon laŭ la kondiĉoj publikigitaj en la jarlibroj de UEA.

Forpasis Emilie Hodler

nekrologo

Tro malfrue por anonci ĝin ankoraŭ en la februara numero de nia revuo, atingis nin la malĝojiga informo, ke forpasis en Nice, Francujo, je la 22-a de januaro 1964, en la aĝo de 86 jaroj, Sinjorino Emilie Hodler, vidvino de Hector Hodler, fondinto de U.E.A. Kun granda respekto kaj simpatio la Estraro de U.E.A. kaj la tuta Asocio memeros ĉiam tiun eminentan kaj ĉarman personon, kies nomon granda plimulto de la esperantistoj konas nur kiel tiun de la edzino de Hector Hodler, sed kiu havis rimarkindan propran personecon.

Kun kompleta sinofero ŝi dediĉis sin tute al la edzo kaj subtenis ties laborojn por la Internacia Lingvo kvankam, kiel ŝi mem foje diris jardekojn poste, kelkfoje ŝi sentis Esperanton kiel rivalon en la koro de la edzo. Ne mankis al ŝi ankaŭ seniluziigoj kaj amaraj momentoj. La tro frua morto de la edzo forte skuis ŝian vivon.

Dum multaj jaroj ŝi apenaŭ havis rilatojn kun la movado kaj kelkfoje ŝi povis demandi sin, ĉu valoris la vivofero de la edzo. Tre feliĉa ŝi estis, kiam antaŭ kvar jaroj ni sukcesis restarigi kun ŝi la kontakton. Grandan

kontentigon donis al ŝi la ekscio, ke la hodiaŭa moderna movado firme staras sur la bazo kiun konstruis ŝia edzo kaj ke liaj celoj estas iom post iom sisteme realigataj. Tute speciale interesis ŝin la lerneja kampanjo kaj la progresoj inter la junularo. Kiam en 1962 ŝi ne povis realigi sian intencon ĉeesti la Universalan Kongreson, ŝi donacis sumon de 1000 sv. fr. kun deziresprimo ke ĝi estu uzita por helpi la junularan movadon.

Ni tre ĝojis ke ni povis doni al ŝi en alta aĝo la konvinkon, ke neniuj laboroj de la neforgesebla edzo, nek liaj grandaj monoferoj estis vanaj.

Oni enterigis S-inon Hodler la 25-an de januaro en Genevo, en la familia tombokelo, kie ripozas ankaŭ la edzo. La ceremonio estis simpla kaj digna. Ĉeestis nur malmultaj personoj, inter kiuj kelkaj lokaj esperantistoj.

Ĉi sube sekvas kelkaj vortoj pri S-ino Hodler de S-ro Kürsteiner, Honora Prezidanto de U.E.A., kaj de S-ro Sturzenegger, Komitatano de U.E.A. en Svislando, kiu konservis sufiĉe oftajn rilatojn kun ŝi ekde 1960.

Sinjorino Emilie Hodler

Kvardek kvar jarojn post la morto de Hector Hodler, kunfondinto kaj gvidanto de U.E.A., forpasis lia edzino, Emilie Hodler, naskita Ruch, 86-jara en Nice.

Lerninte Esperanton nur supraĵe, ŝi dediĉis sin al sindona zorgado de la edzo, kio permesis al li labori — la vorto: senhalte ne diras tro multe — por Esperanto kaj ĝia praktika uzado. Ne estas la loko tie ĉi por memori lin, kiu kun Edmond Privat donis direkton al la movado.

Dank' al malavara donaco de Hector Hodler en 1920, je valoro borsa de 176.000 sv. frankoj, U.E.A. povis restarigi ĉion. La sumo estis malpliigita nur per — konsiderinda — imposto. Sinjorino Hodler neniel faris opozicion je tiu grava malaltigo de ŝia laŭleĝa heredaĵo, estante sola heredantino; kontraŭe, ŝi konfirmis ne nur la mondonacon, sed ankaŭ la transdonon de la revuo "Esperanto" kaj de la esperantista parto de la biblioteko de U.E.A.

Loĝante duonjare en Nice, alian duonjaron en Lausanne, Sinjorino Hodler vivis por tiel diri kun la memoroj pri la eksterordinara homo kiu estis la edzo. Malavare ŝi subtenis diskrete la helpon al esperantistoj en landoj suferintaj pro la lasta milito kaj ĉiel interesiĝis pri homaranisma agado de la Asocio, kreita de ŝia edzo. Ĉiuj, kiuj konis ŝin, konservas memoron pri ŝia oferemo en konvena momento.

Hans Kürsteiner

Honora Prezidanto de U.E.A.

Lastjaraj kontaktoj

Dum la lastaj jaroj mi havis la privilegion kaj ĝojon periode viziti Sinjorinon Hodler en ŝia hejmo en Pully apud Lausanne, kie ŝi pasigis la somerajn monatojn.

Sinjorino Hodler ŝatis la konversacion, filozofii pri la vivo. Ŝi belege, digne, klare kaj malrapide parolis. Kvankam estas 50-jara interspaco inter ŝia aĝo kaj la mia, abundis ĉiam la temoj priparolindaj. Ŝi same vigle interesiĝis pri novaĵoj, ekzemple la funkciado de la magnetofono, kiel pri malnovaj tempoj. Krom tio ŝi havis mirindegan memor-kapablon eĉ por okazintaĵoj de la lastaj jaroj: neniuj detalo eskapis!

Antaŭ du jaroj ŝi certe estus partopreninta la Kopenhagan Kongreson, se ne estus teminta pri la longa vojaĝo. Ŝi skribis (en franca lingvo ĉar, kvankam ŝi bone komprenis Esperanton, ŝi ne skribis ĝin):

"Malgraŭ mia deziro kaj granda plezuro kiun mi travivus ree troviĝante inter la anoj de tiu "Esperanto", al kiu mia kara edzo dediĉis sian vivon kaj kiun noblan aferon li tiel deziris vidi triumfanta per la enkonduko de tiu lingvo en la lernejojn, mi kredas tamen ke, pro mia aĝo kaj mia sanstato, kiu ne estis tre bona en la lasta tempo, estas preferinde ke mi ne entreprenu tiun longan vojaĝon tien reen..."

Mi estas tre danka pro la neforgeseblaj horoj, kiujn mi darfis pasigi en la hejmo de la ĉarma, vigla vidvino de la eminenta Hector Hodler.

J. J. Sturzenegger

esperanto
marto
1964

U.E.A. KANDIDATO POR LA NOBEL-PACPREMIO EN 1964

Laŭ la informoj, pri kiuj disponas CED, nombro da kvalifikitaj personoj el diversaj landoj denove proponis al la Nobel-Packomitato en Oslo Universalan Esperanto-Asocion kiel kandidaton por la Nobel-Pacpremio en la jaro 1964. La rezulto estos konata nur fine de tiu ĉi jaro.

ESPERANTLINGVAJ RADIOELSENDOJ EN 1963

Laŭ la statistiko, ellaborita de la kunlaboranto de CED por la Radio, s-ro G. Larglantier, la nombro de ĉiuj Esperantaj radio-elsendoj en 1963 estis entute 1701 kompare kun 1677 en 1962 kaj 1485 en 1961. La kresko en la nombro de elsendoj estas do 24. Entute 20 stacioj en 13 landoj, precize kiel en la jaro 1962, elsendis programojn en la Internacia Lingvo. Kiel en la antaŭaj 3 jaroj, la rekordon havas Radio Varsovio, kiu elsendis 365 programojn en la daŭro de entute 182,30 horoj. Laŭ la nombro de programoj sekvas Bern kun 208, Romo kun 156 kaj Sofio kun 104 programoj. En la statistiko ne estas enkalkulitaj la sporadaj, neregulaj elsendoj, tiel ke la supraj ciferoj rilatas nur al la regulaj diversspecaj Esperanto-programoj.

La landaj asocioj kaj la lokaj grupoj en urboj kun radio-stacioj devus vaste utiligi la jam ekzistantajn Esperanto-elsendojn por apogi siajn klopodojn enkonduki la lingvon por la programoj de la radio-stacioj, kiuj ankoraŭ ne utiligas Esperanton. Ĉiu unuopa aŭskultanto de la radio-elsendoj en Esperanto devus skribi almenaŭ unu fojon en la jaro al

ĉiuj radio-stacioj, kiuj elsendas en la Internacia Lingvo. Kuraĝigoj, komentoj kaj bonintencaj kritikoj multe helpas al plibonigo kaj vastigo de la programoj.

CED-DOKUMENTOJ EN ESPERANTO

CED ankoraŭfoje atentigas, ke ĝi intencas eldoni siajn dokumentojn ankaŭ en la Internacia Lingvo, se troviĝos minimume 100 regulaj abonantoj. La jara abono por la esperantlingva eldono estos 5,50 gld. La lasta dato por sin anonci estas la fino de aprilo 1964. Ĉiuj interesigantoj bv. relegi la informon en la februara numero de "Esperanto" en la rubriko de CED.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 30-a de septembro 1963	100-	0-	1
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro K. McLennan, Britujo	2-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro A. Santos Quito, Ekvadoro	3-		6
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-		5
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1-	0-	0
S-ro Lecocq, Francujo	6-		0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-		5
S-ro H. Groendijk, Nederlando	1-	0-	0
S-ro van Aelst, Belgujo	6-		11
S-ro E. Carlén, Svedujo	11-	2-	3
Escuela Argentina de Esperanto	2-	10-	0
S-ro P. Bouvier, Svislando	2-	1-	8
S-ro S. Sjöblom, Svedujo	2-	0-	0

La stato je la 31-a de decembro 1963 138-11- 3

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenis ĝian laboron per donacoj en 1963. Tute apartan dankon meritas s-ro E. F. Dean, kiu sola kontribuis preskaŭ duonon de la supra sumo! La liston de donacintoj ekde la 1-a de januaro 1964 ni publikigos en la aprila numero. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

letero

ĈU NI EJRRARIS?

Sendube oni jam rimarkis pri la ekzemplo de prononco de la litero E en la Fundamento de Esperanto sur p. 57 en la angla parto. Oni diras ke la prononco de E estas kiel a en *make*. Laŭ mia kompreno la literumo de *make* Esperante estus mejk, ne mek. Se mi eraras mi volas scii kaj mi instruos laŭ tiu instrukcio en la Fundamento kaj mi diros: "Mi ejrraris, studejntoj — vi dejvas diri: Ejs-pejrranto".

Catherine Schulze (Kalifornio)

Estas malfacile indiki la "koloron" de la Esperantaj vokaloj per nacilingvaj ekzemploj. Pli efike estas aŭdigi diskojn kaj sonbendojn de diverslandaj parolantoj. Plej gravas, kompreneble, ke oni kontrastigu "melo" kaj "mejlo", "veno" kaj "vejno", ktp.

JAM PRETA !

en unu tolbindita volumo
la revuoj

"Esperanto" 1963
"Monda Kulturo" 1962-3

448 p., ora surpriso

Por MA de 1963: 12,50 gld
por aliaj: 20,- gld

Nebindita jarkolekto de "Monda Kulturo", 1962-3 nur 10,- gld.

Ago kaj reago, de Francisco Cândido XAVIER. Trad. L. C. Porto Carreiro NETO. Eld. Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro 1963. 233 p. 18 × 12 cm. Romano.*

Tiu ĉi spiritisma romano fakte estas lernolibro de la kristana spiritisma doktrino en formo de rakonto.

Laŭ la tradukinto la temo estas tiu sama de la "Infero" de Dante Alighieri. La leganto tamen ne atendu danteskajn scenojn. La rakonto kondukas lin ne en la inferon mem, sed en iun "rebonigan regionon", t.e. speco de purgatorio, kie regas ne la teruro de la infero, sed la paco de Dia amo helpanta la pekintojn reboniĝi por iom post iom — tra pli aŭ malpli multaj reenkarnejoj — leviĝi al la Ĉielo. Nur kelkfoje la aŭtoro malfermetas la pordon al la infero, sed oni neniam eniras.

Oni eksentas premeton al la koro, sed nur por mallonga momento. Ne-spiritistoj eble trovos la rakonton iom naiva, monotona kaj trodaŭra. Ĝi ne katenas onin kaj oni havas senton de kontento legante la vorton "Fino".

La nomo de la tradukinto estas garantio por bona, flua Esperanto. En tiu ĉi verko tamen kelkaj superfluaĵoj kaj kelkaj mankantaj akuzativoj, troa kaj malĝusta uzado de la prepozicio ĉe, kelkaj aliaj gramatikaj eraroj kaj sufiĉe granda serio da kritikindaj esprimoj vekas la impreson ke tiun ĉi tradukon li devis fari tro rapide.

Konklude, kvankam kompreneble ne ĉiuj legantoj povos agnoski la spiritismajn konceptojn, la verko estas tamen rekomendinda, ĉar ĝi havas la grandan meriton de altnivela moraleco.

H. Boffejon (Brasschaat)

Esperanta komerca korespondado: leteroj, frazeologio, kontraktoj, de Georgo PAPAKIS. Eld. la aŭtoro, Athine, 1963. 191 p. ofsetita, 19 × 14 cm. Prezo 5,50 gld. (22 st.)*

Estas fakto ke komerco kaj industrio ludas pli kaj pli gravan rolon en nia rapide evoluanta mondo. Se ie, la manko de facila internacia komprenilo akre sentiĝas sur ĉi tiuj terenoj, kie la Esperantistoj ĝis nun apenaŭ aktivis. Tial oni antaŭ nelonge fondis la Instituton por Esperanto en Komerco kaj Industrio, pri kies taskoj kaj laboroj la Esperantistaro poste estos sendube pli detale informata. Jam nun ni povas diri ke la Instituto konsideras la verkadon de libroj pri komerca korespondado kaj kreon de moderna normigita ekonomia terminaro esperanta unu el la plej urgaj kondiĉoj, por ke ni povu montri al la internacia industrio ke Esperanto estos de netaksebla valoro ankaŭ sur ĉi tiu tereno. El ĉi tiu vidpunkto bedaŭrinde ke la ĉi-supra verketo aperis. Mi ne povas ne diri ke stile kaj gramatike ĝi estas erararo kaj tial fakte danĝera en la manoj de nespertaj Esperantistoj kiuj dezirus lerni Esperantan komercan korespondadon. Estas nepre dezirinde ke aŭtoroj de faklibroj interkonsiliĝu kun aliaj kompetentaj Esperantistoj por certigi plejeble bonan rezulton.

La libro estas Esperanta traduko de verko kiu aperis ankaŭ en la angla, germana, hispana, itala, ktp. La nomo de la tradukinto ne estas menciita.

F. Munniksma (Amsterdam)

La du pupoj kaj aliaj rakontoj, de P. A. G. WRIGHT. Eld. SBET, Britujo, 1963. 23 p. 17 × 11 cm., ilustrita. Legolibreto por elementaj lernejoj.

Esperanto-bulgara vortaro, de I. SARAFOV, D. SIMEONOV, K. GEORGIEV, S. HESAPČIEV kaj G. DIMOV. Ŝtata Eldonejo Nauka i Izkustvo, Sofio, 1963. 441 p. 20 × 14 cm., tolbindita. 10.000 ekz.

Frazaro Esperanto-Japana, de Ŝ. NAKAGAŬA. Eld. Japana Esperanto-Instituto, 1963, 37 p. 14,5 × 8,5 cm. Prezo: 0,75 gld. (3 st.)*

Vojaĝon prepari estas vojaĝon antaŭĝui. Jen, por la Tokiaj olimpikoj ĉi-jaraj kaj nia U.K. en 1965, niaj japanaj amikoj eldonis frazareton kiu ebligas al vi diri japane "bonan tagon", "ĝis revido" kaj iom pli. Vi ne ĝemos sub signoj de interplektitaj hokoj kaj kurboj, sed legos la japanan tekston presitan per niaj konataj Esperanto-literoj. En la Esperantoteksto sidas kelkaj anglismoj, ekz. Haloo! = Saluton!, relajo = stafeto, (salto) tripla = triobla, pingpono = tabloteniso. Bedaŭrinde mankas la tutmonda helpkrio de ĉiu turisto: Kelnero, venu! Eble en Japanujo ne necesa?

W. Schmid (Rotterdam)

En konkurado kun la tempo, de S. RUSINOV. Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, Sofio, 1962. 167 p. 20 × 13 cm., ilustrita. Pri bulgara ekonomio.

Vocabal. Eld. S-ro L. G. Hartridge, 64 Laurier Rd., Addiscombe, Croydon, Britujo. Nova vortludo por anglalingvaj komencantoj de Esperanto. Prezo: 1/6 (3 steloj).

La konsumkooperala movado en Svedujo, de J. LUNDBERG kaj T. ODHE. Eld. Koopera Federacio, Stockholm 15, Svedujo. 24 p. 21 × 15 cm., litografita, ilustrita.

Kalendaro 1964. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 26 p. 25 × 18 cm., kun kolorbildo de ĉinaj artaĵoj.

Legolibretoj por komencantoj: 4 kajeroj multobligitaj kun presitaj kovriloj, 17 × 21 cm. Eld. Lernejo Egerton Park, Denton, Manchester, Anglujo.

Esperanto "O" level subject for G.C.E. (Esperanto, ekzamenobjekto por abiturientoj), eld. Lernejo Egerton Park, Denton, Manchester, Anglujo, 1963. 30 p. 17 × 21 cm, multobligita.

ricevitaj
eldonaĵoj

esperanto
marto
1964

mallongaj novaĵoj

LAŬLANDE

Afriko


- La unua konferenco de afrikaj Naciaj Komisionoj por Unesko (Ugando, septembro 1963) rekomendis ĉie en Afriko instrui la anglan kaj francan lingvojn. La okcident-afrika respubliko Senegalio, aliflanke, jam decidis enkonduki la araban lingvon en ĉiujn publikajn lernejojn.

Aŭstralio

- La 1-an premion de la aŭstralia kongreso (p. 215) gajnis rondo en Nowy Sącz (Pollando). Aliajn gajnis sendintoj el Germanujo, Sovetunio, Nederlando kaj Hungarujo.

Britujo

- Okdek-jaran jubileon festas akademiano M. C. Butler, la konata vortaristo kaj muzikisto, bibliotekisto kaj Honora Prezidanto de BEA, fondinto de la Londonaj Esperanto-Diservoj.



konstruaĵo
Zuiun-
kajkan
(legu sub
Japanujo)

Danlando

- S-ro Simo Milojević el Beograd dum decembro prelegis en danaj lernejoj: 20-foje pri Nepalo (kie li antaŭ 2 jaroj instruis Esperanton) kaj 8-foje pri Jugoslavio. La ilustritajn prelegojn en Esperanto kun traduko en la danan aŭskultis 1.200 gelernantoj kaj 400 plenaĝuloj. La prelegvojaĝon modele organizis Pedagogia E-Rondo de Kopenhago.

Francujo

- La 56-an nacian kongreson (16-18.5.64), kun kabareto de Raymond Schwartz kaj prezento de la filmo "Angoroj", patronas ministro pri klerigo Christian Fouchet kaj ministro pri kulturo André Malraux. Informas U.F.E., 34 rue de Chabrol, Paris X.
- Plej nova indiko pri la kreskanta interesiĝo en francaj sciencaj medioj estis ĉefartikolo redaktora en "Chimie Analytique", konata revuo pri analiza kemio, kiu pledas por Esperanto en scienco.

Israelo

- Al la Centra Pedagogia Komisiono venos propono por nova eksperimento pri "Esperanto kiel baza lingvo", t.e. pri la demando, ĉu Esperanto faciligas lernadon de aliaj lingvoj.

Japanujo

- Gastloĝantoj estas bonvenaj en la nova domo de Mondo-Mesianismo, Atami, kie la servistoj parolas Esperanton.

Kubo

- En Camagüey okazis la unua Esperanto-ekspozicio post la kuba revolucio.

Malto

- Malta Esperanto-Societo aldonis 20 esperantajn librojn al la Reĝa Malta Biblioteko. Lastatempe aperis nombro da gazet-artikoloj.

Mozambiko

- Okaze de la 15-jara datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj Mozambika Esperanto-Asocio aranĝis ampleksan ekspozicion. La ĵurnalo "A Tribuna", kiu jam aperigis kurson de Esperanto, publikigis sur sia unua paĝo artikolon de Prof. Lapenna pri la Deklaracio.

Nederlando

- Baldaŭ aperos kolekto de 20 rakontoj de 20 frislingvaj aŭtoroj modernaj.

Nov-Zelando

- En la 29-a Kongreso fine de decembro prelegis S-ro D. M. Worcester instigante al novzelandan partoprenon en la 50-a U.K. en Japanujo, kie ŝi dum longa periodo instruadis Esperanton. Aparte kunvenis gelernantoj de Esperanto el 18 ŝtataj lernejoj. Raportis radio, televido kaj ĵurnaloj.

Sovetunio

- La soveta delegacio de la 48-a U.K. prezentis ampleksan raporton al oficialaj instancoj kaj atendas favoran rezulton. Komenciĝis pluraj novaj kursoj en Moskvo.
- Ofte aperas tra la mondo represoj aŭ tradukoj el "Esperanto". Plej nove aperis ruslingva kaj gruzlingva tradukoj de artikolo pri la Ruĝa Kruco sur ĵurnaloj en Kutaisi, Gruzio.

LAŬFAKE

Domdekoracio

- Resumojn en Esperanto enkondukis la grandformata kvarmonata revuo hispanlingva "Estilo" pri mebloj, ceramiko, k.s., abonebla ĉe Editorial Ciclo, Cochabamba 525, Buenos Aires, Argentino (5,50 dolaroj por 6 eldonoj).

Religio

- Sub titolo "Kristana Ekumeno" aperis la unua, 22-paĝa multobligita kajero de nova interkonfesia cirkulero "esence teologia". Senpage ricevebla de S-ro S. Maul, Bismarckpl. 2, 84 Regensburg, Germanujo.

Turismo

- Ekaperis la nova grandformata revuo "Ripozoj" kun artikoloj kaj abundaj fotoj pri bulgaraj libertempejoj. Jarabono pere de UEA: 5,50 gld (22 st), por ses numeroj.

49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Den Haag, 1—8 Aŭgusto 1964

Sub la Alta Protektado de Sia Moŝto Juliana,
Reĝino de Nederlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 7 Rotterdam, la 30-an de jan. 1964

Dua Bulteno.

Al ĉiuj aliĝintoj estas sendita la Dua Oficiala Bulteno. En ĝi troviĝas ĝeneralaj informoj pri la Kongreso, ties kompleta provizora programo, programoj de la Infana Kongreseto, Cseh-Seminario, Junulara Kongreso, Antaŭkaj Postkongresoj, plenaj informoj kun mendilo pri loĝado kaj ekskursoj. En la Dua Bulteno troviĝas krome i.a. informoj kaj regularoj pri la Oratora kaj Belarta Konkursoj. La Duan Bultenon ricevas nur la aliĝintoj al la 49-a U.K.

Ĝeneralaj Kunvenoj.

Dum la 49-a U.K. okazos du ĝeneralaj kunvenoj:

- a) La rezultoj de la Junulara Jaro
- b) Diskuto pri la Estrara Raporto; Raportoj de la fakaj asocioj pri la fakkunvenoj okazintaj dum la kongreso.

Sekcioj.

Dum la 49-a U.K. estos du laboraj sekcioj, kies temoj estos:

- a) La eduka valoro de la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj
- b) Aplikado de modernaj metodoj en la informado pri Esperanto.

Statistiko (ĝis 29-1-'64).

Argentino 3, Aŭstralio 6, Aŭstrujo 16, Belgujo 24, Brazilo 2, Britujo 129, Bulgarujo 305, Centrafrika Resp. 1, Ĉeĥoslovakujo 10, Ĉilio 1, Danlando 33, Finnlando 29, Francujo 180, Germanujo 120, Hindujo 1, Hispanujo 12, Hungarujo 78, Indonezio 1, Israelo 2, Italujo 44, Japanujo 6, Jugoslavio 53, Kuvajto 1, Luksemburgo 1, Madagaskaro 1, Malio 1, Monako 5, Nederlando 259, Norvegujo 11, Nov-Zelando 1, Pollando 119, Portugalujo 2, Sovetunio 1, Svedujo 73, Svisujo 17, Usono 9, Venezuelo 2. Entute 1559 el 37 landoj (pasintjare 1480 el 35 landoj).

G. G. Pompilio



KIAL "ADOPTAJ GEPATROJ" ?

Diri kiom da infanoj parolantaj Esperanton troviĝas en la diversaj landoj estas preskaŭ neeble.

Diri kiom da infanoj parolantaj Esperanton deziras partpreni foje en Internacia Infana Kongreseto estas multe pli facile. Ĉiun jaron la organizantoj de Infana Kongreseto ricevas multe da petoj kaj ĉiam pli ol kontentigan nombron da aliĝoj.

Bedaŭrinde ĉiun jaron la organizantoj troviĝas antaŭ la malĝojiga konstato ke ne ĉiuj petantoj povas fariĝi anoj de la Infana Kongreseto. Multaj ne povas plenumi sian deziron pro manko de mono aŭ, eĉ havante la monon, pro manko de devizoj por la forveturo.

Por doni fine al kiel eble plej multe da infanoj — modele parolantaj Esperanton — la ĝojon vivi dum unu semajno en la ĉarma kaj neforgesebla sfero de Internacia Kongreseto, estis starigita antaŭ kelkaj jaroj la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj" kun la celo kolekti monon por tiuj infanoj.

Kiel organizanto de la 9-a Internacia Infana Kongreseto, la Kongresa Komitato de Den Haag sin turnas al la unuopaj esperantistoj tra la mondo, al la landaj, fakaj kaj lokaj esperantistaj societoj kaj al ĉiu, por kiu la feliĉo de tiuj infanoj kaj la estonto de la Internacia Lingvo estas kara, kun varma alvoko malavare fariĝi "Adoptaj Gepatroj". La kotizo estas fiksita je 30.— ned. gld. (120 steloj) pageblaj ĉe la kontoj de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando (Pĉk. 378964 — Banko: R. Mees & Zoonen, Rotterdam) aŭ ĉe la kongresaj perantoj.


La "adopto" ne rilatas al aparta infano, sed al komuna kaso. La sumoj kolektitaj per la kotizoj de la "Adoptaj Gepatroj" estos uzitaj

ekskluzive por pagi la vetur- kaj restadkostojn al infanoj el landoj malproksimaj aŭ kun devizaj malfacilaĵoj aŭ el nebonstataj familioj.

La Kongresa Komitato opinias ke la meritoj pli valoras ol la financoj kaj ke la kolektiva volo kaj entuziasmo de la Esperanto-Movado povas ankoraŭfoje solve la malfacilaĵojn kaj kontribui al la sukceso de la Kongreseto. Ĉiu esperantisto helpu al tiu ĉi kampanjo, subtenu la klopodojn fari la Infanan Kongreseton pli internacia kaj apogu laŭ tiu vojo la disvastigon de Esperanto ĉe la plej juna generacio.

*nederlanda
tradicio:
stratorgeno*

**esperanto
marto
1964 53**



Marto
 28-30 Markola renkontiĝo en Kalezo, Franc.
 29-30 Argentina Kongreso en Florencio Varela
 30-7/4 Kultura semajno Grésillon
 31 Kotizoj UK Hago, IJK Amsterdam
 altiĝos

Aprilo

30 Limdato Int. Ekzameno (p. 34)

Majo

9-15 IFEF-Kongreso en Bruselo
 15-18 Brita Kongreso en Bridlington
 16-18 Germana Kongreso en Soltaŭ
 Franca Kongreso en Parizo (p. 52)
 Belga Kongreso en Liège
 31 Limdato Belartaj Konk. (p. 173, 222)

Junio

26-28 Kanada Kongreso en Ottawa
 30 Limdato aliĝo 49-a U.K. Hago

Julio

1 Limdato foto-konkurso (p. 34)

2 Sezono Grésillon komenciĝas
 3- 5 Usona Kongreso en Nov-Jorko
 5- 8 Tria Somera Universitato, Gyula, Hung.
 5- 9 Jugoslavia Kongreso, Rijeka, Kroatio
 9-20 Int. Junulara Kunveno, Balaton, Hung.
 11-13 Bulgara Kongreso en Pleven
 11-14 Ĝen. Kunveno de INOE, St. Chéron,
 16-22 Int. Seminario Bulg. E. J., Primorsko
 21-24 Hispana Kongreso en Valencia
 23-29 IKUE-Kongreso en Valencia
 25-31 Kvina Geografia Semajno, Groningen
 SAT-Kongreso en Narbonne
 25-1/8 KELI-Kongreso, Lunteren, Nederl.
 30-1/8 Antaŭkongreso en Bruselo (p. 216)

Aŭgusto

1 UK-kotizoj por Tokio plialtiĝos
 1- 8 49-a Universala Kongreso, Hago
 8-12 Postkongreso en Leeuwarden (p. 216)
 9-16 20a IJK de TEJO, Amsterdam (p. 175)
 9-17 Int. Ferioj, Krommenie, Ned. (p. 20)


**memoriga
kalendaro**

STATISTIKO 1963

Lando	AM	MJ	MA	MS	P	DM	HM	J-MJ	J-MA	Sumo	membro- statistiko
Karibaj Insuloj	—	—	1	1	—	—	—	—	—	2	
Katario	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1	
Kenjo	—	—	2	—	—	1	—	—	—	3	
Kolombio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Kongio (eksfranca)	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1	
Kongol. (eksbelga)	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Koreo	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3	
Kostariko	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1	
Kubo	—	—	2	—	—	1	—	—	—	3	
Liĥtenstejno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Luksemburgo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Madagaskaro	26	2	13	4	—	—	—	—	1	46	
Makao	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Malezio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Malio	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2	
Malto	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Maroko	—	—	3	2	—	2	—	—	—	7	
Meksikio	—	1	20	—	—	2	—	—	—	23	
Monako	40	1	5	—	—	—	—	—	—	46	
Mozambiko	—	—	4	—	—	—	—	—	—	4	
Nederlando	570	63	358	24	—	59	4	2	4	1084	
Nigerio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Norvegujo	490	18	95	10	—	13	1	1	2	630	
Novzelando	261	29	79	7	—	17	—	—	3	396	
Pakistano	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Pollando	3150	2	269	—	—	2	—	—	6	3429	
Portoriko	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	
Portugalujo	—	1	42	4	—	3	3	—	—	53	
Rodezio	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1	
Rumanujo	—	—	4	—	—	—	—	—	—	4	
Solomonaj Ins.	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1	
Senegalio	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2	
Sovetunio	—	2	120	1	—	2	—	—	1	126	
Sudafriko	—	2	11	1	—	6	—	—	—	20	
Svedujo	1500	113	343	88	—	36	—	1	6	2087	
Svislando	94	84	125	12	—	46	1	1	1	364	
Tajlando	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1	
Turkujo	—	1	7	—	—	—	—	—	—	8	
Urugvajo	50	1	8	—	—	1	1	—	—	61	
Usono	266	30	257	56	—	44	2	2	24	681	
Venezuelo	—	—	19	—	—	—	—	—	—	19	
84 landoj	26472	862	5338	478	1	553	39	30	172	33945	

**esperanto
marto**

1964 55



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
Ivo Osibov, Splitskog odreda 15,
SPLIT, Jugoslavio.**

EL LA LANDAJ SEKCIOJ

— *Francujo.* La Redaktron atingis la novaĵo ke en Parizo naskiĝas junulara grupo. Ĝian kernon oni vidas en la grupo de Parizaj gejunuloj, kiuj kune pasigis la jarfinan nokton en la kastelo Grésillon.

Ni salutas la klopodojn de niaj junaj geamikoj kaj deziras, ke la grupo baldaŭ organiziĝu kaj organizite ekagu inter la junularo de la franca metropolo.

— *Hispanujo.* Laŭ HEJS-bulteno, dank' al la Esperanto-sekcio de Radio Club la junaj esperantistoj uzas por siaj kunvenoj dufoje semajne la ejon de Radio Club. Tie ili organizis mezan Esperanto-kurson, kiun gvidas P-ro J. Aragay kaj elementan kurson por infanoj.

Jen imitinda ekzemplo de kunlaboro inter niaj junularaj grupoj kaj aliaj societoj kaj kluboj.

— *Polujo.* Sileziaj gejunuloj esperantistaj kune ĝis-atendis la novan jaron dum la 3-a Novjara Junulara Renkontiĝo, kiun organizis PEJ-rondo en Chorzów, kune kun membroj de Internacia Geografia Asocio kaj membroj el Zabrze, en monta pitoreska vilaĝo Istebna. La programo ampleksis kvintagan restadon (31. XII — 5. I) kun diversaj konkursoj kaj aranĝoj.

La plej belan kostumon, laŭ la konkurserzulto, havis Stefania Stuchlik. Estis nomitaj la plej ĉarmaj partoprenantoj: Irena Fuchs kaj J. Ciboj. En la oratora konkurso pri la temo "Moderna edzino — moderna edzo — imago kaj fakto" la unuan premion gajnis Rudolf Skorupa kaj en la foto-konkurso venkis F. Widera per la foto "Infanoj". (Informis R. Skorupa).



ĈU VI JAM ALIĜIS AL NIA 20-a ?

Se ne, bonvolu duonfermi la okulojn kaj rev-imagu:

...afabla suno (aŭ refreŝiga pluvo) super vicoj da individuaj tegmentoj ruĝaj kaj bluaj. Malnovstilaj fasadoj reflektiĝantaj en kvietaj graŭtoj. Neta domo inter tiuj, tuj apud svelta, majesta turo, jen la Anne Frank Domo. En ĝi svarmas amaso da junaj homoj interbruante gajsfere. Poste regas silento solena: okazas la oficiala inaŭguro en ĉeesto de diversaj altaj gastoj. Ankaŭ reprezentantoj de aliaj junular-organizoj (i.a. W.A.Y.) salutas la kongreson. Sekvas gvidataj vizitoj al la mallargaj ĉambroj supre, en kiuj vivetis la familio Frank sammaniere kiel miloj da aliaj, dum la kruelaj okupaciaj jaroj 1940—1945. La Taglibro de Anne Frank datas ĝis 1944. Vespere tiun dimanĉtagon kronas speciala prezento de la fama, profesia Internacia Arta Teatro, en luksa teatrosalono.

En la sekvanta tago la kongreson akceptos kaj rondveturadon donacos la magistrato de Amsterdam. El blankaj salonboatoj vi admiros diversepokajn fasadojn, jen pompajn, jen ĉarmajn, el 1600 ĝis 1900. Vespere vi dum-promene ilin revidos enlumigitaj.

Postan tagon regalos nin la Amstel-bierfarejo per... (neĝusta respondo!)... per lunĉo kaj filmprogramo. La riĉan programon ebligis ankaŭ aliaj donacoj: de la ŝtato, de I(nternational) B(usiness) M(achines), de laktofabrika Nutricia kaj de aliaj.

Ne forgesu la afablan vilaĝon Broek (pron.: "Bruk"), kiu aranĝos tutan, oficialan festosemajnon dum la kongreso.

La arbaroriĉa regiono "Het Gooi" (do ne Alkmaar) estos nia ekskursejo. Ĝi estas kvazaŭ la ĝardeno de Amsterdam. Hilversum estas ĝia centro, kie la fama urbdomo (vidu "Esperanto", jan. 1964, p. 8) el 1927 (eble enhavanta akcepteman urbestraron) kaj la AVRO-radio-ejo estos niaj viktimoj. Fine ni heroe invados la aŭtentikan kastelon de Muiden, plantante la Esperantoflagon sur la bastionoj. Jam en la 17-a jarcento tiu kastelo estis (kaj ĝis nun estas) kultura centro. Post nia vizito ĝiaj ruinoj maksimume estos vultura centro. Almiĝu al ĉi ĉio la ĝuon de interamika rendezuo, kaj rezulte jen revo pli ol rava. Estu bonvena!

P.S. — Atentu la grandiozan foto-konkurson *Gevaert pri temo de Anne Frank!*

— Jam nun estas certe, ke belega fotolibro akompanos la I.J.K.-kongreslibron.

La Kongresa Komitato informas

SANĜO DE LA KONGRESAJ KOTIZOJ

Bonvolu noti la ŝanĝon de la kongresaj kotizoj, kiuj validos post la 1-a de Aprilo. Antaŭ la anoncita sumo, la partoprenantoj, kiuj aliĝos post tiu dato pagos 85.— gld., se ili estas malpli ol 20-jaraj, aŭ 90.— gld., se ili estas pli ol 20-jaraj. Nemembroj de TEJO pagas 5.— gld. pli. Ĉi tiuj kotizoj estas definitivaj.

Do, ne prokrastu, sed aliĝu tuj. Per tio vi faciligos la laboron de la Kongresa Komitato kaj eluzos favoran prezon.

DELEGITOJ

Aŭstralio

Melbourne FD (Kinematografio):

S-ino I. Fina, instruistino, 88 Headingley Rd, Mt. Waverley; tel. 23-7240.

Syney FD (Bibliotekoj):

S-ro F. Dunn, katalogisto, 11/137 Bronte Rd, Waverley.

Aŭstrujo

Graz FD (Fruktkulturo): vakas.

FD (Religio: novrevelacio): S-ro J. Eder, fruktkulturisto, Stattegg-Eichberg 13.

Belgujo

Antwerpen FD (Doganoj): S-ro J. B. R. Van Humbeeck, doganisto, 296 Dambruggestraat; tel. 03-31.30.64.

Brugge FD (Sporto: ŝako): S-ro R. Iserentant, armea adjutanto, Kerklaan 61.

Edegem (Antwerpen) 10.000.

FD (Fervojo): S-ro C. S. Meeus, inĝeniero, Oude God str. 170.

Gent FD (Filatelo): vakas.

Brazilo

Antônio Dias D: vakas.

Bauru (São Paulo) 94.000.

D: S-ro S. Paiva, emerita fervojisto, Rua Alto Purus 7-28; tel. 1650.

Campinas VD: S-ro O. Hoff, poŝtfako 1064.

Manaus (Amazonas) 180.000.

D: S-ro R. Pereira de Mélo, ŝtatoficisto, Rua L. Malcher, 834-A-2, Caixa Postal 72.

FD (Religio: Spiritismo): la D.

Resende FD (Aŭtomobiloj): S-ro R. Mattos, leŭtenanto, Seção ensino motomecanização, Academia militar das Agulhas Negras; tel. 291 kaj 43.

Rio de Janeiro FD (Astronomio):

S-ro I. Colonna Valevski, oficisto, Praça da República 54, 2º.

FD (Dozena kalkulo): la FD (Astronomio).

FD (Sukerfabrikado): S-ro B. Collect de Araujo, industriisto, Pedro Alves 319; tel. 43-4830.

Santos D: vakas.

VD: vakas.

FD (Bankoj: S-ro F. S. Almada, bankoficisto, Avenida Bernardino de Campos 630-apto 26.

FD (Sporto: ŝako): vakas.

FD (Turismo): vakas.

São Paulo FD (Astronomio): vakas.

FD (Bankaj aferoj): vakas.

FD (Dozena kalkulo): vakas.

FD (Religio: kristana kongregacio):

S-ro A. L. Cardoso, bankoficisto, Rua 15 de Novembro 275, Banco Comercio e Indústria de São Paulo s/a.

Britujo

Bellingham D: vakas.

FD (Arkologio): vakas.

Farnham (Surrey) 25.000.

D: S-ro M. Garnett, asekuristo, "Clovelly", Lickfolds Rd, Rowledge; tel. Frensham 2820.

FD (Ŝipasekuro): la D.

Hailsham (Sussex) 6.000.

D: S-ro E. H. A. Beck, inĝeniero, 59 Harebeating Cresc.; tel. 965.

Leicester FD (Instruado): S-ro W. Marshall, instruisto, 70 Bulwer Rd, Clarendon Pk; tel. 73414.

Stretford D: vakas.

Bulgarujo

Ĉefdelegito: vakas.

Kolarovgrad D: S-ro I. J. Andreev, tornisto, str. "Sredna-gora" 31.

FD (Pripacaj aferoj): S-ro A. D. Bojaĝiev, emerita ĵurnalisto, str. "Zografska" 33; tel. 25-02.

Sofio D: vakas.

FD (Ekonomia geografio): vakas.

FD (Fotografio): S-ro L. Marikin, emerita instruisto, ul. Dimo H. Dimov 53.

Ĉeĥoslovakio

Praha FD (Maŝinoj): vakas.

Danlando

Aarhus FD (Instruado): vakas.

FD (U.N.-aferoj): la VD.

Fakse Ladeplads D: vakas.

FD (Ornitologio): vakas.

Helsingør JD: S-ro T. Kehlet, fotografo, Gl. Hellebaekvej 61 A.

København FD (Arto): vakas.

FD (Religio: Martinus): S-ro H. Laug, inspektoro, Vanløse Alle 80, Vanløse; tel. 71 76 40.

FD (Sociaj aferoj): vakas.

Lyngby FD (Laboristaj aferoj): S-ro E. Jansson, trikisto, Bagsvaerdvej 71 E; tel. 877471.

Rungsted Kyst (Sjaelland) 5.000.

D: S-ino Z. Heide, teknikistino, Sophienbergvej 49, tel. (03) 861271.

Stepping D: vakas.

FD (Instruado) vakas.

Finnlando

Helsingin maalaiskunta (Uudenmaanlääni) D: S-ro Erkki Järvinen, fajlisto, Vihertie, Vantaa.

Helsinki-Pihlajamäki VD:

S-ro Reino Lampinen, oficejoĉefo, Liusketie 10 b 9; tel. 633 808.

FD (Geodezio): D-ro Erkki Kääriäinen, ŝtata geodezo, Edelfeltintie 3 A 6, tel. 634636.

Tikkakoski (Keski-Suomen lääni) D: S-ro Aulo Kustaa Minell, konstruinspektoro; tel. JYV 32316, oficejo JYV 14660/16.

Vääksy (Hämeen lääni) 3.000.

D: S-ro Taisto Suontausta, inspektoro; tel. Lahti 61 270.

VD: F-ino Hilikka Akkala, hejmfratulino, Terveystalo; tel. Lahti 61177.

Francujo

Bordeaux (Gironde) 409.000.

FD (Tendumado): S-ro René Lavallee, interpretisto ĉe Apelacia Kortumo, 63 Avenue Carnot, Cauderan (Gironde).

Boulogne-Billancourt (Seine) 105.000:

FD (Pripacaj aferoj): S-ro J. Thomas, tipografisto, 4, Rue Louis Pasteur.

Cauderan (Gironde) 30.000.

D: S-ro Marcel Maurin, pensiulo, 279, Avenue de la République; tel. 52.10.64 Bordeaux.

VD: S-ro René Lavallée, interpretisto ĉe Apelacia Kortumo, 63, Avenue Carnot.

FD (Mondcivitaneco): la VD.

FD (Virinaj Aferoj): S-ino Simonne

Lavallée-Berthomieu, 63, Avenue Carnot.

Codognan (Gard) FD (Tendumado): vakas.

oficiala
informilo
n-ro 366
1 feb. 1964

esperanto
marto
1964

oficiala
informilo

Crest (Drôme) 6500.
D: S-ro V. L. Giber, emerita komerca
reprezentanto, Avenue Jean Rabot,
Quartier St. Ferreol; tel. 482.
Le Cailar (Gard) D: vakas.
FD (Junulargastejoj): vakas.
FD (Religio: Protestantismo): vakas.
Le Chambon-Feugerolles (Loire) ĉ. 21.000.
D: D-ro J. M. Dumas, kuracisto, 15 Cité du
Bouchet.
FD (Medicino): la D.
Licques (Pas-de Calais) D: vakas.
Roanne (Loire) D: vakas.
FD (Medicino): vakas.

Germanujo

Krefeld (Rheinland) FD (Pedagogio): vakas.
Mainz (65) (Rheinland-Pfalz) 130.000
FD (Religio: Evangelia Kristanismo): S-ro
Willi Huch, impostinspektoro en pensio,
Schaftriedweg 78; tel. 25 821.
Moenchengladbach (Nordrhein) D: vakas.
Oberursel FD (Medicino) D-ro Herbert Künzel,
kuracisto, Lindenstr. 10.

Hispanujo

Sevilla FD (Fervojo): vakas.

Indonezio

Djakarta (Djawa Barat) 3000.000.
D: S-ro Khwat Liat Kho, oficisto de Ekster-
landa Ministerio, Gang Mandor VII No. 7.

Italujo

Como 80.000.
VD: S-ro M. Meroni, oficisto-librotenisto, Via
Carloni 7; tel. 24957.
FD (Turismo): S-ro Aldo De Giorgi, inter-
pretisto, Via Recchi 7; tel. 22984.
Massa (Massa Carrara)
D: S-ro Stagi, universitata studento, Via
Marina Vecchia 87 A.
Roma (Lazio) 2.100.000.
FD (Fervojoj): S-ro De Salvo, fervoja
oficisto/studento pri juro, Piazza della
Croce Rossa 1.
Torino (Piemonte) 1.050.000
FD (Fotografio): S-ro P. Garnero, instruisto,
Via Cibrario 87; tel. Torino 75.03.77.

Japanujo

Amagasaki (Hyōgo-ken).
FD (Filatelo): vakas.
Hiroŝima-ŝi (Hiroŝima-ken) 433.000
JD: S-ro Hiroŝi Sasaki, universitata studento,
P.O. Kesto 9, Hiroŝima-Ujina.

Jugoslavio

Črnomelj (Slovenija) D: vakas.
Osijek (Hrvatska) D: vakas.
FD (Varkontrolo): vakas.
Šentilj v. Slovenski Gorici (Slovenija) 4.400
D: S-ro Izidor Golob, oficisto, Šentilj 118/a;
tel. 21 (oficejo).
Zagreb (Hrvatska) 500.000.
FD (Jurnalismo): S-ro Zlata Flego,
ĵurnalistino, Draškovićeve 29.

Kanado

Duncan (B. C.) D: vakas.
FD (Socikredito): vakas.
Quebec (Quebec) 350.000.
VD: S-ro Vincent Beaupré, brikindustriisto,
738 Clairmont; tel. 653-3052.

FD (Asekuro): S-ro E. Melanson,
reklamaciestro 717 St. Cyrille W.;
tel. 527-3548.

Libano

Bejrut D: vakas.

Nederlando

Aerdenhout (N. Holland) 20.000.
D: S-ro G. J. Rodenhuis-Boll,
Ruys de Perezlaan 2; tel. (02500) 4 12 16.
FD (Mastrumado): la D.
Amsterdam-Z.
VD: S-ro Alex d'Oliveyra, tradukisto/
korektisto, Watteaustraat 9-IV; tel. 73 35 12.
FD (Komerco/Industrio): S-ro Feiko
Munniksma, tradukisto en farmacia
industrio, Tweede Boerhaavestr. 40;
tel. 5 14 48
FD (Komerco-libroj): S-ro Henk van Dalen,
ĉefo de la vendado, Sonneveld 36
(Buitenveldert); tel. 42 37 10.
FD (Naturismo): vakas.
Arnhem (Gelderland) 140.000
FD (Instruado): S-ro P. J. Roorda,
eksdirektoro de mezlernejo,
Cattepoelseweg 99; tel. (08300) 2 15 95.
Bloemendaal (N. Holland) 20.000.
FD (Instruado): S-ro Jacobus Janssen, em.
lernejestro, Rijperweg 12; tel. (02500) 5 11 20.
Blokker (N. Holland) 3.000.
FD (Literaturo nederlanda): F-ro Corry
van Kleef, profesorino, Koewijzend 28.
Boskoop (Z. Holland) D: vakas.
FD (Arbkulturo): vakas.
Bussum (N. Holland) 50.000.
FD (Komerco/industrio): S-ro Jan Muller,
ekonomiisto, Burgemeester s'Jacoblaan 42;
tel. 02959-17820.
Coevorden (Drente) 10.000.
FD (Rotario): D-ro Gerrit Tj. Knol,
dentkuracisto, van Heutszsingel 7;
tel. (05240) 27 34.
De Bilt (Utrecht) 26.000.
FD (Muziko): S-ro Henk Valkenier,
muzikredaktoro kaj muzikinstruisto,
Parkflat de Akker 179; tel. (030) 6 15 73.
Delft (Z. Holland) D: vakas.
Den Haag (Z. Holland)
FD (Fotografado): S-ro F. G. Kokken,
ĉefo-muntisto (P.T.T.),
Oosterhesselenstraat 124; tel. 81 40 84
(oficejo).
FD (Komerco): S-ro Cornelis Bal, komercisto,
Jac. Cabelliastraat 5; tel. (070) 55 62 68.
Haarlem (N. Holland)
FD (Poŝto T.T.): S-ro Frans Smit, pensiulo,
Fred. Hendriklaan 33; tel. 3 49 57.
Heiloo (N. Holland) 13.000.
D: S-ro Simon de Geus, domfarbisto,
Heerenweg 181; tel. 02200-31040.
Hengelo (Overijssel).
FD (Kinematografio): S-ro Jan G. Kuster,
entreprenisto, Paulinastr.; tel. (05400) 1 93 95.
FD (Ornitologio): La FD (Kinem.)
Nieuw Scheemda (Groningen) D: vakas.
FD (Instruado): vakas.
Nunspeet (Gelderland) 25.000.
D: S-ro H. J. Blokspeel, pensiulo, Berken-
laantje 15; tel. (03412) 27 15.

Roderwolde (Drente) 935.

FD (Instruado): S-ro P. van der Velde,
lernejestro, No. 72.

Rotterdam (Z. Holland) 735.000.

FD (Entreprena organizado): S-ro Cornelis
van der Vlies, scienca oficisto, Centrum
voor Onderzoekingswerk, Nederlandsche
Economische Hoogeschool, Pieter de
Hoochweg 118; tel. 56520.

FD (Socia laboro): F-ino Marjon Hoesbergen,
socia laboristino ĉe la Komunumo
Rotterdam, Franselaan 188 A.

Utrecht VD: vakas.

Vaals (Limburg) D: vakas.

Wormerveer 12.000 (N. Holland)

FD (Asekuro): S-ro J. T. Fischer, kontoristo,
Franklinstraat 12; tel. (02980) 8 15 44.

Zwijndrecht (Z. Holland) D: vakas.

Norvegujo

Asker (Akershus) 20.000.

D: S-ino Pepita de Caspary, art-flikistino,
"La Nesto".

FD (Art-flikado): la D.

Bergen FD (Novnorvega lingvo) S-ro Arnljot
Kyllingstad, studento, Bøhmerg 22; tel. 9 46 20.

FD (studentaj aferoj): La FD (Novnorv.)

Nov-Zelando

Lower Hutt (Wellington) D: vakas.

FD (Aŭtomobilaj aferoj): vakas.

Pollando

Bydgoszcz FD (Muziko): S-ro Jerzy Barbarski,
muzikestro, str. Topolowa 6 m 44.

Gorzów Wlkp (Zielona Góra) 65.000. D: S-ro
W. Klimek, instruisto, ul. Sikorskiego 134-4;
tel. 41-98.

FD (Matematiko): la D.

Konin (vojevodio Poznań) 25.000.

D: S-ro J. Zych, inĝeniero, al. 1 Maja 14/10;
FD (Tekniko): la D.

Lublin 210.000.

FD (Fervojoj) S-ro E. Majewski, fervoja
teknikisto, ul. 1—90. Maja 43 m. 2.

Toruń (Pomoze) 112.000.

FD (Kemio): F-ino Irene Laskowska,
kemiistino, Mickiewiczstrato 23/69;
tel. 28-41.

Warszawa D: S-ro Bronisław

Tuszkiewicz, oficisto, Ursynowska 12 m. 3.

Zielona Gora 80.000.

D: S-ro Zdzisław Błazejczyk, instruisto,
Poŝtkesto 4; tel. 26.58.

FD (Korespondado): la D.

Portugalujo

Silveira (Pico Acoroj) D: S-ro Manuel Gomes.

FD (Geografio): la D.

Sovet-Unio

Moskva FD (Kemio): S-ro Boris V. Tokarev,
scienclaboranto kaj instruisto en altlernejo,
Bol. Pionerskij per. 10 kv. 6; tel. 5-3-28-47.

Svedujo

Gävle (Gästrikland) 60.000.

VD: S-ro Herbert Stjernlöf, laborestro,
4e Tvörgatan 49, tel. 026/25104.

FD (Instruado): S-ro Arne Lenner, gimnazia
instruisto, Byggmästargatan 15;
tel. 026/26807.

FD (Literaturo): S-ro Folke Wejbro, gimnazia
instruisto, S. Kansligatan 28; tel. 026-10602.

Malmö 235.000.

D: S-ino Gun Andersson, Hasselgatan 19;
tel. 96 31 13.

Storuman (Lappland) 2.000.

D: S-ro Rune Wingefalk, poŝtficisto, Träd-
gårdsvägen 3.

FD (Poŝto): la D.

Trelleborg FD (Librobindado): vakas.

Svislando

Basel 220.000.

VD: S-ro Hans-Martin Stamm, instruisto,
Kartausgasse 5, tel. (061) 33 43 30.

FD (Filatelo): la VD.

Biel-Bienne (Berne) 63.000.

D: S-ro Jean-Pierre Botteron, instruisto,
chemin des Mésanges 8; tel. (032) 3.77.05.

FD (Edukado): la D.

Genève 200.000.

D: S-ro Claude Piron, tradukisto, 5, Chemin
des Palettes, Grand-Lancy; tel. 42.81.55.

FD (Lako-tekniko): vakas.

La Chaux-de-Fonds (Neuchâtel) 40.000.

D: F-ino Cosette Giroud,
mastrum-instruistino, Jonquilles 8;
tel. (039) 2.44.79.

Luzern 72.000.

D: S-ro Rinaldo Albus, inĝeniero dipl.,
Studhaldenstr. 26; tel. (041) 2.85.35.

Neuchâtel 32.000.

FD (Pediatrio): D-ro Alfred Wenger, pediatro,
Promenade Noire 3.

Winterthur FD (Kooperativaj aferoj): vakas.

Usono

Cambridge (Mass.) JD: S-ro Humphrey Tonkin,
esplorstudento, 7 Linnaean Street;
tel. UN 8 — 6007.

El Cerrito (California) 26.800.

S-ro Clarkson Crane, verkisto, 309 Pomona
Avenue; tel. 525-0602.

FD (Literaturo): la D.

Glendale (California) 125.457.

D: S-ro Merrill O. Jackson, publika kontisto,
1744 Stanton Avenue; tel. 244-3722.

FD (Religio-Unitarismo): la D.

Juneau (Alaska) 6.000: S-ro W. L. Gnagy,
geologo, P.O. Box 1987.

FD (geologio): la D.

Lawrence (Kansas) JD: vakas.

Los Angeles (California).

FD (Religio: Katolikismo): S-ro E. J. Baker,
kolegia studanto, 2215 Crenshaw Blvd;
tel. 732-5647.

New York (New York).

JD: S-ro Richard Kollin, studento, 30 Ave B;
tel. YO2-3217.

Pasadena D: vakas.

FD (Juro): vakas.

San Marino (California) 13.000.

D: S-ro William W. Glenny, patent-advokato,
2705 Carlaris Road; tel. 627-0371.

FD (Juro): la D.

South San Gabriel (California 91777)

ĉ. 9.000 D: J. H. Fulton, kemiisto, 2337 North
Denton Avenue.

FD (Kemio): la D.

Tucson (Arizona) 213.000.

FD (Astronomio): S-ro W. Murawski,
studento, S.U.P.O. Box 10425, University
of Arizona.

**oficiala
informilo**

kiu
ne
pagis
por
1964
tiu
ne
ric
evos
la
apr
ilan
eld
onon
de
tiu
ĉi
revuo

**esperanto
marto
1964**

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Andoo, S-ro Hiroŝi, Kaŭasaki-ŝi, Japanujo;
Anjer, S-ino Agnete, Oslo, Norvegujo;
Anjer, S-ro Ludvig, Oslo, Norvegujo;
Arranz, D-ro P., Madrid-1, Hispanujo;
Böcker, S-ro H., Gelsenkirchen, Germanujo;
Cartledge, S-ino G. F., Sheffield, Britujo;
Caspary, S-ino P. de, Asker, Norvegujo;
Charles, S-ro Russell J., Camp Hill, Usono;
Cottet-Dumoulin, S-ro, Paris XIV, Francujo;
Greutert, S-ro K., Giubiasco, Svislando;
Hansen, S-ino Maria, Stockholm, Svedujo;
Hernández Llusera, S-ro V., Sabadell, Hisp.;
Hohl, S-ro J., Flims-Dorf, Svislando;
Jackson, S-ro Merrill, Glendale, Usono;
Jager, F-ino A. J. M. de, Amsterdam, Nederl.;
Lavallée, S-ino H., Le Havre, Francujo;
Leon, S-ro L., Manchester 8, Britujo;
Lindberg, S-ro E., Bowmansville, Usono;
Linde, S-ino E. C. v. d., Groningen, Nederlando;
Lyons, D-ro James T., Galena Park, Usono;
McGrath, S-ino R., Mount Pleasant, Aŭstralio;
Mertin, S-ino E., Irschenberg, Germanujo;
Nilsson, S-ino A., Stockholm SV, Svedujo;
Privat, S-ino Y., Neuchâtel, Svislando;
Rousseau, S-ro J-A., Paris 14, Francujo;
Schouten, S-ro J. J., Haarlem, Nederlando;
Schweizer, S-ro K., Riehen, Svislando;
Slot, S-ino Mr. A. M., Zeist, Nederlando;
Solar, F-ino A., London, N.W. 10, Britujo;
Thomas, S-ro E., Lyss, Svislando.

PATRONO 1964

1. Smith, S-ro N. R., Kumasi, Ganao, Okc. Afr.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

82. Grahovac, S-ro Ilja, Fitzroy, Aŭstralio;
83. Jaumotte, S-ro M., Antwerpen, Belgujo;
84. Almada, S-ro F. de S., Santos, Brazilo;
85. Araujo, S-ro G. S. de, Rio de Janeiro;
86. Araujo, F-ino I. B. de, Rio de Janeiro;
87. Braga, S-ro I. Gomes, Rio de Janeiro;
88. Carvalho, S-ro E. M. de, Belo Horizonte;
89. Coutinho, S-ro A. C., Rio de Janeiro;
90. Dionisio, S-ro C. H., São Leopoldo, Braz.
91. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro;
92. Drucker, S-ro Gert, Curitiba, Brazilo;
93. Lima, S-ro Alvaro H., Rio de Janeiro;
94. Melo, S-ro R. Per. de, Manaus, Brazilo;
95. Nunes, S-ro E. Pereira, São Paulo,
96. Oliveira, S-ro L. J. de, Santos, Brazilo;
97. Pádua, Gen. G. A. G. de, Belo Horizonte;
98. Peixoto, S-ro O., Niterói, Brazilo;
99. Pinto, S-ro J. D., Santo André, Brazilo;
100. Rezende, D-ro C., Belo Horizonte;
101. Silva, S-ino I. M. de, Rio de Janeiro;
102. Silva, S-ro P. Vieira da, Brasília D.F.;
103. Souza, S-ro J. B. de Melo e, Ipanema;
104. Souza, S-ro N. Pereira de, Brasília;
105. Vaz, S-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo;
106. Verde, D-ro D. L., Limoeiro do Norte;
107. Wehrs, F-ino E., Niterói, Brazilo;
108. Bowell, F-ino B., Cromhall, Britujo;
109. Cross, S-ino D., Leicester, Britujo;
110. Hanson, S-ro C. G., Teighmouth, Britujo;
111. Ingham, S-ro H., Liverpool 22, Britujo;
112. Knight, S-ino E. B., London, N. 6;
113. Leather, S-ro A. J., Altrincham, Britujo;

POR VASTIGO DE LA AGADO

S-ro K. Schlüter, Germanujo: 4,50 gld.
Entute: 13.939,57 gld.

DONACOJ POR GENERALA KASO

S-ro W. Reich, Brooklyn, Usono: 18,— gld.
S-ro Theo K. Oakvid, Kalifornio: 25,20 gld.
S-ro K. Schlüter, Germanujo: 9,— gld.
S-ro Friedrich Kraus, Germanujo: 3,60 gld.
D-ro A. Halbedl, Knittelfeld: 1,55 gld.
S-ro Heinz Schindler, Germanujo: 3,— gld.

FONDAJO CANUTO

S-ro R. H. Bossong, Nederlando: 1 MJ

FONDAJO ZAMENHOF

S-ro J. V. Holleman, Nederlando: 10,— gld.

FONDAJO JUNULARA GAZETO

Pluraj Esperantistoj el Munkeno: 18,— gld.
Entute: 603,22 gld.

DONACOJ INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro W. Reich, Brooklyn, Usono: 18,— gld.
S-ro W. A. Verloren van Themaat: 7,— gld.
S-ro Leslie Leon, Manchester: 10,— gld.

LA POŝTMARKKOLEKTADO

En 1963 kolektiĝis la ĝis nun plej granda kvanto da poŝtmarkoj. Vendiĝis por 2120 d. kr. = 1115 gld. Precipe la lastajn monatojn de la jaro venis multaj, kio grandparte ŝuldiĝas al s-ro G. van Heek, Nederlando. S-ro van Heek multe propagandis la aferon en gazetoj kaj eĉ en radio.

Daŭre rimarkindaj estas la novzelandaj esperantistoj, kiuj en 1963 sendis 100.000 poŝtmarkojn. Nian plej koran dankon al s-ino Y. M. Canty, kiu dum unujara foresto de s-ino Rita Aagaard prizorgas la kolektadon en la klubo en Auckland. Kvin libropremioj sendiĝis al:

1. S-ino Y. M. Canty, Novzelando. 2. S-ino W. Addis, Sud-Aŭstralio. 3. S-ino I. M. J. Dijkhoff-Lenze, Nederlando. 4. S-ro d-ro T. R. H. Berrie, Nigerio. 5. S-ro Ramon Molera, Hispanio.

Akceptas daŭre ĉiaspecajn poŝtmarkojn:

Peter Zacho, Slotsherrensvej 218, Vanløse, Kopenhago, Danlando.

PETU PROSPEKTON PRI



ĈE I.T.C. - GEB. 114
SCHIPHOL NEDERLAND

ANONCETOJ

Informojn pri la katolika religio oni povas senpage ricevi de la Internacia Katolika Informejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

La Idolo plej longe Vivanta. La temo de tiu libro estas la limigita vivkoncepto de la nuntempa homaro, kaj la grandiozo de la ĉirkaŭa naturo. La idolo plej longe vivanta estas la homo mem. (95 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. Fortika verda tolkovrilo kun ora surpriso. Frezo 6.50 d.kr.). Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Diapozitivaj: Jam 100 kluboj en la mondo prelegas uzante niajn diapozitivajn. Kaj vi? Informas: Lentaigne, 3 Gaillarde, Montpellier, Francujo (nur por pagipovaj landoj).

Du Nederlandaninoj, Willy den Dekker, — 40-jara infangvidistino — Vrijenbansestraat 41B, Rotterdam-11, kaj Marjon Hoesbergen — 35-jara socia laboristino — Franselaan 188A, Rotterdam-7, esperas viziti Japanujon dum la 50a Kongreso. Ili nun serĉas geamikojn en Japanujo (Tokio kaj aliaj urboj) unue por korespondi pri ĉiuj temoj.

Esperantista hejma helpantino. Ni serĉas esperante parolantan junulinon aŭ vidvinon kiel helpantinon de la mastrino en la hejmo. La hejmo troviĝas en absolute moderna, komforta vilao en industria vilaĝo proksime al Örebro. La familio konsistas el la geedzoj kaj 10-jara knabo. Salajro sv.Kr. 300.— pomonate. Propra ĉambro. La vojaĝkostojn al Svedujo ni pagos, kaj ĉe minimuma restado de unu jaro ankaŭ la vojaĝon reen. Al interesulinoj ni donos informojn pri libertempo k.a. Respondo al Sinjorino Rut Carlén, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro Juan Parareda, Str. San Pedro 28, Tarrasa (Barcelona), interŝanĝas pm., pk. kaj il. gazetojn.

Franca filatelisto serĉas ĉiulandajn korespondant(in)ojn por interŝanĝi poŝtmarkojn. Ĉiu ricevos respondon. Skribu al Tete Joël, Montmoreau, Charente, Francujo.

S-ro J. W. van den Oever Valkhof 209, Amsterdam (Nederlando) deziras korespondi kun Esperantistoj pri modernaj moneroj el la tuta mondo.

20-jara junulo volas korespondi kun gejunuloj en ĉiuj landoj. Skribu al: Roberto Sheed, 3, Langham Gardens, Edgware, Middx, Anglujo.

Danko. Estas neeble al mi danki al tiom de afablaj samideanoj, kiuj rememoris min okaze de mia 80-jariĝo. Mi petas pardonon, ke mi nur per tiu ĉi vojo tutkore dankas al ĉiuj. Julie Šupichová, en Praha.

Samideanoj dezirantaj ricevi diversajn malnovajn bulgarajn poŝtmarkojn kaj ankaŭ malnovajn numerojn de "Esperanto", povas skribi al S-ro St. Minkov, str. Sredna Gora 129, Sofia 3, Bulgarujo.

Originalaj verkoj de

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

LA GRANDA AVENTURO

de Ferenc Szilágyi

en stilo flua, varia kaj eleganta
broŝ. gld. 4,75; bind. gld. 6,—

VIVO VOKAS

de Stellan Engholm

en stilo simpla kaj neafekta
broŝ. gld. 4,75; bind. gld. 6,—

SIPESTRO RAKONTAS

de kapitano F. T. Lundquist

pri travivaĵoj sur la sep maroj
broŝ. gld. 3,75; bind. gld. 6,—

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.

Helsingör

invitas vin pasigi ferian semajnon en La internacia Altlernejo 19.—26. julio inter samideanoj el multaj diversaj landoj. Petu senpagan prospekton ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando

KONTAKTO

SEN PAGE

vi ricevos la junularan revuon

KONTAKTO

dum 1964, se vi pagis kiel MA
kaj naskiĝis en 1939 aŭ poste.
Tuj informu nin pri la dato de
via naskiĝo !

KONTAKTO



- Kiam mi estos plenaĝa, mi fariĝos piloto. Mi ĉirkaŭflugos Afrikon en unu horo..... Mi flugos al Japanujo kaj Ameriko.... kaj iun tagon mi eĉ flugos al la luno!

Paciencon, mia knabo, paciencon! Via fantazio kurigas vin tro rapide. Nur longjara, pena laborado povas realigi viajn revojn.

- Sed, mi volas fariĝi elstara piloto. Neniam mi riskos ion ajn kaj post ĉiu flugo mi alterigos sekure miajn pasaĝerojn kaj kunnavigistojn.

Bonege, junulo. Kaj kiam via revo efektiviĝos, tiam memoru, ke, alte en la aero kiel ankaŭ surtere, Philips plifaciligas vian taskon dank' al la plej fidindaj elektronikaj ekipaĵoj: radio-sendiloj kaj riceviloj, telegrafoj, signal-stacioj, ĉiuspecaj instrumentoj por esplorado kaj elprovado, instalaĵoj de radaro kaj lumigado:

Tiam, samkiel nuntempe, Philips helpas por fari nian mondon pli loĝinda. Tiam, samkiel nuntempe, Philips konservas la spiriton, kiu faris ĝiajn produktojn mondfamaj por sekureco kaj fidindeco, jam pli ol sepdek jarojn.

Hodiaŭ - kaj estontece - rigardu al

PHILIPS

